

# ESPERANTO

INTERNACIA REVUO ESPERANTISTA

N-ro 536

JUNIO 1950

B  
U  
R  
Ĝ  
O  
N  
O  
J

*Viŭu p. 86*





# DETEKTIVAJ KAJ MISTERAJ ROMANOJ

EN ESPERANTO

		prezo	afranko
<b>FERIO KUN LA MORTO</b> .. .. .	70 paĝoj broŝ.	4ŝ. 6p.	2p.
(originale de Karl Lindquist—loko Danlando)			
<b>MOREA PERLO</b> .. .. .	224 paĝoj broŝ.	3ŝ. 3p.	4p.
(D. Simson ; trad. R. Delpasko—loko Nederlando)			
<b>MORTO DE TRAJNO</b> .. .. .	256 paĝoj bind.	9ŝ. 0p.	6p.
(Freeman Wills Crofts : trad. M. Stuttard—loko Anglujo)			
<b>MURDO EN LA ORIENTA EKSPRESO</b> .. .. .	183 paĝoj broŝ.	1ŝ. 6p.	3p.
(Agatha Christie : trad. 'Etulo'—loko en la trajno)			
<b>NEKONATA KONATO, LA</b> .. .. .	122 paĝoj bind.	4ŝ. 0p.	6p.
(originale de D. P. Boatman—loko Anglujo)			
<b>PASTRO BROWN, LA NAIVECO DE</b> .. .. .	256 paĝoj bind.	5ŝ. 0p.	6p.
(G. K. Chesterton : trad. C. Bean—loko Anglujo)			

*Mendu ĉe*

**UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO**

Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo

## HUNGARLANDO PROGRESANTA

La dua mondmilito faris en Hungarlando teruran detruon, sed la laborantoj de la hungara popol-demokratio forigis per oferona laboro dum 2½-jara sukcesa plenumo de la 3-jara plano la ruinojn.

Per rapidlaboro ni rekonstruis niajn fervojliniojn kaj pontojn. Ni rekonstruis niajn fabrikejojn, publikajn konstruaĵojn kaj loĝdomojn.

Samtempe ni zorgis pri refreŝigejoj kaj sporteblecoj por la laborantoj. La novkonstruitaj refreŝigejoj kaj sportlokoj servas nun la ripozon, korpan hardigon kaj amuzadon de la vastaj popolamasoj.

La altnivelaj kultur-institutoj de la popol-demokratio atingis jam eĉ la plej malgrandan hungaran vilaĝon.

Kun informoj kaj klariga literaturo volonte servas la

**IBUSZ** Fremdultrafika kaj Informa Oficejo,  
Deák Ferenc u.2, Budapest V., Hungarujo.

23 rakontoj en unu libro  
tute taŭgaj por komencantoj

## PREMIAJ ROMANETOJ

96 paĝoj : a frankite 2ŝ. 8p. (10 rpk.)

La plej bonaj el 200  
en konkurso aranĝita de

**The Esperanto Publishing Co. Ltd.**



*Mendu ĉe*

**UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO,**

Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo



# ESPERANTO

INTERNACIA REVUO ESPERANTISTA

43-a JARA Junio 1950

N-ro 536 (6)

Oficiala organo de  
Universala Esperanto-Asocio

Fondinto : H. HODLER

Redaktoro :  
HANS JAKOB

Helpredaktoro :  
MASON STUTTARD

Ĉion por la redakcio sendu al  
ESPERANTO  
Palais Wilson, Genève, Svis.

Traduko kaj represo de artikoloj  
estas permesataj, kondiĉe ke oni  
citu la fonton. Por bibliografia  
celo oni sendu periodaĵon en kiu  
aperas represo el ESPERANTO,  
al nia redakcio.

Ĉion pri administrado de UEA  
kaj de la revuo ESPERANTO,  
abonado, reklamoj, anoncetoj  
sendu al

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO  
Heronsgate, Rickmansworth  
Herts., Anglujo

Jara abono : 8 ŝil. anglaj  
(kun membreco kaj jarlibro  
12s. 6p.)

Ĉefdelegitoj kaj Perantoj en  
multaj landoj

#### Tarifo por reklamoj :

1 paĝo 1/5 : 1/4 paĝo 50 ŝil.  
1/2 paĝo 25 ŝil. : 1/2 paĝo 12.5 ŝil.

#### Anoncetoj pri korespondado :

2 pencoj por unu vorto aŭ  
1 int. respondkupono por ĉiu  
duo da vortoj

Legantoj en 74 landoj

## LA 35-a ESTOS LABORA KONGRESO

De multaj jaroj sennombraj esperantistoj plendas, ke niaj  
Universalaj Kongresoj fariĝis pli-malpli turismaj aranĝoj kun  
partopreno de sufiĉe multenombraj novbakitaj esperantistoj.

La 35-a prezentos vere internacian laboran kongreson, kies  
efiko por la internacia kaj franca gazetaro estos ege grava. Ĉiu  
kongresano, kiu deziras vere helpi en la praktika disvastiĝo de nia  
lingvo, havos la eblecon partopreni en unu el la 4 sekcioj de la  
kongreso aŭ ties Komisionoj, laŭ la ĉi-suba divido :

### 1-a Sekcio : Esperanto en la lernejoj :

Komisionoj : (a) Esperanto en la unuagradaj lernejoj  
(b) Esperanto en la duagradaj kaj teknikaj lernejoj  
(c) Esperanto en supera instruado  
(ĉ) Esperanto kiel helplingvo por blinduloj kaj surduloj.

### 2-a Sekcio : Internacia Trafiko kaj Komerco :

Komisionoj : (a) Esperanto en komerco kaj industrio  
(b) Esperanto en la prifervojaj rilatoj  
(c) Esperanto kaj P.T.T.  
(ĉ) Esperanto en internacia polico  
(d) Esperanto en specimeno-foiroj  
(e) Esperanto en permaraj rilatoj  
(f) Esperanto en la peraeraj rilatoj  
(g) Turismo—Banko, Borso, Dogano.

### 3-a Sekcio : Sciencoj kaj Teknikoj :

Komisionoj : (a) Sciencoj moralaj kaj politikaj (Sociologio, ekonomio,  
juro, politiko, inkluzive de filozofio kaj eventuale  
aliaj branĉoj)  
(b) Sciencoj naturaj (Fiziko, kemio, medicino, kun  
farmacio, geografio, eventuale aliaj branĉoj)  
(c) Sciencoj teknikaj (Arkitekturo, konstruado, elektro-  
tekniko, urbanismo kaj eventuale aliaj branĉoj).

### 4-a Sekcio : Internaciaj intelektaj intersanĝoj :

Komisionoj : (a) Radio kaj televido  
(b) Stenografio  
(c) Biblioteko kaj dokumentado  
(ĉ) Plastikaj artoj  
(d) Humanismo  
(e) Beletristiko  
(f) Teatro  
(g) Kino

La Estraro de U.E.A. komisiis al nia honora prezidanto Gen. L.  
Bastien kaj al la tri el la Estraro, S-ro D. Kennedy, Prof. D-ro I.  
Lapenna, kaj la subskribinto la respondecon pri la sukceso de tiuj  
novaj aranĝoj de nia Universala Kongreso.

Ni estas certaj, ke ĉiu partoprenonto de la 35-a nepre deziros  
helpi en tiu sukceso. Je la nomo de la Estraro de nia granda U.E.A.  
ni antaŭe dankas ilin por ties helpo.

*P. Petit, Estrarano de U.E.A.  
Speciala komisiito por organizo de U.K.*



# KVIN SEMAJNOJN POR ESPERANTO EN ISLANDO

## PROPAGANDA VIZITO DE

PROF. D-RO IVO LAPENNA

Kiel ĉiuj infanoj, ankaŭ mi, foje antaŭ multaj jaroj, legis Jules Verne. Fantaziaj bildoj tiam viciĝis antaŭ la okuloj. Revataj, nekonataj regionoj, malproksimaj astroj kaj planedoj ricevadis en la imagoj firmajn, realajn konturojn.

La tempo fluis. Novaj impresoj poste amasiĝis. Aliaj konceptoj formiĝis. Kaj la bildoj komencis paliĝi por fine kaŝiĝi sub la kurtenon de l'forgeso . . . .

En la vespera krepusko, post kvarhora flugado super la oceano, rigardante el bela kvarmotora aviadilo la *novan* landon, mi rememoris pri la legaĵoj iam streĉintaj mian atenton. La iamaj imagoj preskaŭ realiĝis. Nigraj rokoj vipataj de ŝaŭmantaj ondegoj, pintaj montoj leviĝantaj minace alten, dezertaj senarabaj glaciaj ebenaĵoj . . .

Tia estis la unua, elaera impresoj pri Islando.

Kiam ni alteriĝis—estis la 1-a de marto—la ventego skuis la koloson kiel arbfolieton. Neĝo kovris la teron. Nenie verdaĵo. Nenie kreskaĵo. Froste.

Ĉe la elirejo unu esperantisto. Mi provis alrideti. Manpremo. Malvarma estis ankaŭ lia mano.

Tio estis la dua, surtera impresoj pri Islando.

Antaŭ pli ol mil jaroj la unua koloniiginto nomis ĝin *glacia lando*. Prave, mi pensis.

Reykjavík, la ĉefurbo kun ĉirkaŭ 50,000 loĝantoj, estas bele, lukse lumigita. Nenie en la mondo oni, kredeble, tiom malŝparas la elektran energion. Abunde ĝin provizas gigantaj akvofaloj. En la maro da brilanta helo estis tuj pli gaje. La bildoj iom ŝanĝiĝis!

En la bela malgranda loĝejo kun multe da intimo, kun grandaj fenestroj, estis jam vere agrable. Tagnokte grandaj tubegoj rekte alkondukas en la hejmojn de Islando varmon el bolantaj fontoj. Ili nutras per ĝi ankaŭ la vintroĝardenojn en kiuj kreskas bananoj kaj maturiĝas vinberoj! Ĉar sub la glacia krusto, en profundo de la tero, ardas fajro. Ĝi traboras al si la vojon al la surfaco. Gejseroj ĵetas akvoŝprucojn ĝis sesdek metrojn alten. Vulkanoj elverŝas el siaj buŝegoj nigriĝontan lafon.

Vere, Islando ne estas nur glacia. Ĝia interno estas fajra.

\* \* \*

Kaj la homoj? Ili iom similas al la grundo, kiu naskis ilin. Sub la ŝajne malvarma supraĵo



*Tipa malnova farnbieno*

kaŝiĝas flama koro, profundaj kaj noblaj sentoj, sincera entuziasmo por ĉio bela. Ne, eble, surlipe sed en la spiritoj, en la cerboj, en la agoj. Oni devas resti nur dekon da tagoj inter la islandaj geesperantistoj por konvinkiĝi.

Mi restis inter ili kvin semajnojn. En la komuna laboro, kiun ni faris nome de nia U.E.A. por la Internacia Lingvo, en la libera konversacio, dum la belegaj ekskursoj, en la ĉiutaga senpera kontakto, mi povis certigi ne nur pri la ĝenerala alta klereco de tiu-ĉi 150-mila popolo, sed ankaŭ pri la grava signifo de la islanda Esperantomovado en la mondaj kadroj.

En Islando ne ekzistas analfabetoj. La librejoj estas plenplenaj de libroj. La gazetoj aperas en pluraj dekmiloj da ekzempleroj. En ĉiu hejmo—ankaŭ en la Esperanto-societo de Reykjavík— troviĝas radio-aparato. Oni legas kaj aŭskultas tie. Ĉie kaj senĉese. Tial la meza klerecnivelo estas tre alta.

\* \* \*

La gazetaro kaj la radio multe interesiĝis pri nia afero. Dum unu monato aperis en la islanda gazetaro ok grandaj artikoloj kaj intervjuoj. Longan intervjuon elsendis Radio-Reykjavík. Dudeko da diversaj informoj, sciigoj kaj anoncoj pri la Internacia Lingvo estis publikigitaj aŭ disaŭditaj. Krome, ankaŭ mallonga esperantlingva paroladeto al islanda popolo estis elsendita. La unua, sed espereble ne la lasta, de Radio-Reykjavík.

Okazis ankaŭ pluraj publikaj prelegoj en Reykjavík, Akranes, Haffnarfjörður, Sellfoss . . . . Centoj da personoj aŭskultis ilin. La salonoj estis plenaj. Aparte menciinda estas la lekcio en la universitato, kiun prezidis la rektoro Prof. D-ro Alexander Johannesson kaj ĉestis la profesoro, multaj studentoj kaj intelektuloj.

Esti  
pri E  
ĝenera  
100,00  
loĝant  
povis

Ĉion  
intern  
admin  
agem  
S-ro M  
preleg  
Olafur  
interpr

Mi l  
naciajn  
profesi  
jam a  
traduk  
prepar  
malkor

S-ro  
traduk  
sed ins  
superis  
interpr  
antaŭ  
person  
pruvo  
flekseb

En I  
societoj  
geesper  
ĉirkaŭ  
korespo  
entute l  
bone p  
lernado  
kaj k  
organiz  
ni kom  
1,000,  
loĝant  
vojon.  
flanko  
ĉu ili  
Reykj  
porins  
planit

Ra  
Bela,  
ĝisrev  
An  
Magr  
Magr



Estas malfacile priskribi la gradon de interesiĝo pri Esperanto en Islando. Ĝi respondas al ĝenerala klereco de la popolo. Certe, minimume 100,000 personoj—do **du trionoj de la tuta loĝantaro**—ricevis la necesajn informojn kaj povis konvinkiĝi pri la grandeco de nia lingvo.

\* \* \*

Ĉion ĉi, kiel ankaŭ la diversajn kursojn, internajn prelegojn, kunvenojn, vizitojn al administraj kaj klerigaj aŭtoritatoj, organizis la agema prezidanto de la societo en Reykjavík, S-ro Magnus Jonsson. Por la bona sukceso de la prelegoj la plej grandan meriton havas S-ro Olafur Christiansson, kiu perfekte, adekvate interpretis ilin.

Mi havis multfoje la okazon partopreni internaciajn konferencojn kaj kongresojn. Tie la profesiaj interpretistoj kutime ricevas la tekstojn, jam antaŭe tradukitajn. En tiaj okazoj la tradukoj marŝas. Se ili devas traduki sen preparo, ofte ilia interpretado lamas, aŭ estas eĉ malkorekta!

S-ro Christiansson ne havis la tekston. Li tradukis libere. Li ne estas profesia interpretisto, sed instruisto kaj verkisto. Tamen lia traduko superis multlilate la tradukojn de pluraj profesiaj interpretistoj ĉe UN, ĉe la Pariza Packonferenco, antaŭ la Internacia Kortumo . . . Sendube lia persona merito. Sed, samtempe, ankaŭ evidenta pruvo por la aŭskultantoj pri la facileco kaj fleksebleco de la Internacia Lingvo.


\* \* \*

En Islando nun funkcias la Federacio kaj kvar societoj. Entute iom pli ol 200 organizitaj geesperantistoj. Sed en la lando troviĝas ankoraŭ ĉirkaŭ 500–600 neorganizitaj esperantistoj. En la koresponda kurso kaj en la diversaj kursetoj entute lernas la lingvon ĉ. 150 personoj. Ili vere bone progresas. Tiel bone, ke post unumonata lernado kelkaj el ili povis modeste konversacii kaj kompreni paroladojn. Se la islandaj organizaĵoj daŭrigos la laboron sur la bazoj, kiujn ni komune fortikigis, baldaŭ ili povos havi ĉirkaŭ 1,000, eble eĉ 1,500 membrojn, do 1% de la tuta loĝantaro. Necesas nur insiste sekvi la komencitan vojon. Promesoj estis faritaj de diversaj oficialaj flankoj. Dependas nun de la islandaj geamikoj, ĉu ili realigos la regulajn disaŭdigojn de Radio-Reykjavík, la instruadon de la lingvo en la porinstruitaj seminarioj kaj la aliajn bone planitajn laborojn . . .

\* \* \*

Rapidege forpasis la kvin semajnoj. Bela, kortuŝa, adiaŭa vespero. Paroladetoj, ĝisrevidoj . . .

Ankoraŭfoje en la atendejo de la aerhaveno. Magnus Jonsson kaj la federacia sekretario Olafur Magnusson ĉeestas. Reciprokaj dankoj. Kuraĝigaj




*Skógafoss : Unu el la plej belaj akvofaloj en Islando.*

*Ni esprimas dankon pro la du fotoj al Islanda Turista Agentejo en Londono.*

vortoj. Denove manpremoj. La ventego skuas la koloson. Ekbruas la motoroj. Nur momenton kaj ni jam flugas super Reykjavík. Mi ĵetas la lastan rigardon al glacia lando kun fajra interno, kie vivas homoj kun malvarmaj vizaĝoj kaj ĝentilaj pensoj, kie la Internacia Lingvo havas larĝajn perspektivojn de plua progresado.

*Prof. D-ro Ivo Lapenna.*



### MATENIĜO

#### Sur Morgenster-monto, Rodezio

de J. SEMMELINK

La horo estas dek minutoj antaŭ la sepa. Mi sidas ĉe mia tablo studante la Johano-evangelion pri popolĝvidantoj. Mia edzino malfermas la pordon kaj vokas min. Atinginte la frontverandon de la pastra domo sur la suda deklivo de la misia centro Morgenster, mi rigardas, kien fingromontras mia edzino.

Kia vidaĵo! Kia perspektivo! Antaŭ ni deklivas ĝis la rivereto, kies bruo atingas nin trans la seskilometran interspacon. Trans la rivero ankoraŭ nebulas, sed la nebuloj kuŝas sufiĉe malalte por ebligi al ni rigardi trans ilin al la malproksima ebenaĵo. Tie fore staras kvar montetoj, kiuj ricevas la unuajn radiojn de la leviganta suno. La sunon ni mem ne povas vidi, sed atingas nin la reflektita brilo kiu trafas sur la multajn rokojn de la altaĵoj malproksime, kaj igas ilin kvazaŭ ili estus el arĝento kontraŭ fono de ankoraŭ nubajo preter la plej malproksima. La ebenaĵo inter la montetoj estas flavebruna kun etaj makuloj de malhelverdaj arbetoj kaj arbetoj.

La nova tago progresas kaj pli kaj pli heliĝas. Silente ni staras rigardante, ĝuante, kaj dankante Lin, Kiu donas tiun belon al la mondo. Ho, kiom bela estas Morgenster! Kiel bele ĉiam estas ĝis la homoj venas por detruji la naturan ordon.



Ritchie Calder :

# HOMOJ KONTRAŬ DE DEZERTO

## EN LA POSTSIGNOJ DE LA OKA ARMEO

Benghazi

Alproksimiĝante al la Cirenaika landlimo ni veturis tra tombejo de militmaterialo. La pejzaĝo mejlon post mejlo prezentis spektaklon de prirabitaj tankoj, aŭtomobiloj, aeroplanoj k.t.p.

Ĉe la grava batalloko El Agheila araba posedanto de tielnomita *restoracio* ne povis provizi manĝon, sed ni interkonsentis pri taso da turka kafo farita per akvo el antaŭa benzinskato. Mi trinkis ĝin el viskia glaso sidante en la pilota seĝo de ruiniĝinta aeroplano. Li refuzis pagon, sed insistis, ke mi estu lia gasto, kaj ni poste plenumis la kutiman komplikitan ritaron de tetrinkado—nun tre familiara al mi.

Ĉiu glaso devas esti konsumata kun bruaĵ suĉoj kaj ŝataj ŝmacoj. Se dum dezerta festeno oni ankaŭ ruktas laŭte, tio estas la plej alta komplimento al la gastiganto, kaj ĉiuj diras "Alaho estu laŭdata!"

Apud Barce estas ampleksaj tritik-terenoj, grandskala mekanikigita projekto de la Britoj, ekzistanta de 1942. Troviĝas ankaŭ forlasitaj kolonioj de la Italoj. Sed Cirenaiko ne estas *memsufiĉa* kaj la britaj civitanoj devas pagi el siaj impostoj kvaronon de la elspezoj. Kun nur unu persono por ĉiu kvadratmejlo (330,000) mankas sufiĉe da homoj por kultivado de la lando, kontraste kun Egiptujo, kie troas la loĝantoj. Cirenaiko estas lando de nomadoj, kaj memsufiĉeco postulas konstantan kultivadon, sed



Plantado de rizo



Templo de Philae, Egiptujo  
uzata kiel rezervejo de akvo

ne nomadisman. Krome, ankoraŭ tute mankas specialistoj inter la indiĝenoj.

*Burg El Arab, Egiptujo*

"Gardu vin kontraŭ la skorpioj" avertis min D-ro Milad Bey, dum niaj okuloj alkiutimiĝis, post la brilego de la suno, al la malhelo de la subtera Milita Ĉestabejo. Ĉi tiuj fi-insektoj malkovris la agrablon de ĉi tiu betona kazemato.

La kazemato estas ampleksa ŝirmejo el dek du ĉambroj, konstruita de la Brita Oka Armeo malantaŭ El Alamein. Inter ĝia konstruo kaj la romana cisterno etendiĝas 2,000 jaroj, sed la britaj sapeistoj ne sciis pli daŭre aŭ pli vaste konstrui, ol la Romanoj. Kiam D-ro Youssef Milad Bey, Direktoro de Dezert-Agrikulturo, parolis pri cisternoj, mia ideo estis urbane limigita.

Mi ne atendis la gigantan subteran kavernon kun altaj volbitaj haloj kaj disbranĉaj galerioj. La ĉefĉambroj estas alta preskaŭ 80 futojn, kaj forpaŝante de la plej malsupra ŝtupo, mi preskaŭ mem konstatis, kiom profunda estas la akvo; nur ĝustatempe retira mano evitigis al mi tian sperton.

Ekzistas centoj da romanaj cisterno kaj putoj en la dezerto, kaj ili estas iom post iom rebonigataj. Ili ne dependas de fontoj, sed kolektas la pluvon, kiu falas sur la teron en areoj, kie la meza falo laŭ jardekoj estas po 6 coloj jare—kelkare povas esti neniom da pluvo, alijare ĝis dek coloj.

La  
tre lert  
ĉi tiun  
subtav  
vegeta  
teron,  
ke la  
cistern  
venas  
ĉerpi a  
konser  
eĉ jar  
male,  
ĝenas  
kribra  
forigi

Bur  
esplor  
evolui  
planto  
dezert  
ankora  
fekund  
Kiam  
dum la

Riga  
decidi  
planto  
Tiucel  
luktan  
organi  
montr  
Al ĝi l  
Ili tiel  
valoris  
kaj p  
kultiv  
okcide  
nomad  
koloni

Se o  
taŭgar  
horde  
kaj fo  
arbon  
restas  
de li l  
detru  
iviste  
arabi  
la b  
siaj  
E  
deze  
nur  
me  
20




La romanaj hidrologoj estis tre lertaj. Ili elektis lokon, kiel ĉi tiun, kun malalta eĝo kaj roka subtavolo. Poste ili forigis la vegetaĵon kaj konturigis la teron, ne por kultivado, sed por ke la akvo rapide fluu en la cisternon. Hodiaŭ nomadoj venas dek mejlojn aŭ eĉ pli por ĉerpi akvon. Komprenoble, akvo konservita ne nur monatojn, sed eĉ jarojn, ne estas tre freŝa, sed male, vivoplena. Tio tamen ne ĝenas la nomadojn. Ili simple kribras ĝin tra muslino por forigi la vivaĵojn.

Burgel Arabnun estas floranta esplorcentro por la studo kaj evoluigo de dezertaj arboj kaj plantoj, kaj la bredado de dezertaj bestoj. Ĝi estas ankoraŭ unu nerefutebla argumento por la esenca fekundeco de la dezerto sub ĝusta administrado. Kiam oni komencis, ĝi estis nuda dezerto, kaj dum la milito ĝi estis denove dezertigita.

Rigardante la militan detruon, D-ro Milad Bey decidis, ke antaŭ ol fari la dezerton alloga por plantoj, estas necese fari ĝin alloga por homoj. Tiucele li persvadis la aŭtoritatulojn konstrui luksan gastejon kun ĉiaj agrablaĵoj. Ĉirkaŭ ĝi li organizis *montrofenestron* el belaj ĝardenoj kaj montraĵ terpecoj, ekspozicion de floranta dezerto. Al ĝi li invitis multajn eminentulojn kaj gravulojn. Ili tiel impresiĝis sub tiaj kondiĉoj, ke la gastejo valoris miloble pli ol centoj da memorandumoj kaj petskriboj. Nun ekzistas 1,200 akreoj da kultivita tero, kaj novaj farmbienoj etendiĝas okcidenten al El Alamein. Ĉi tiu estis lando de nomadoj, sed nun ili ne plu vagas. Ili anstataŭe koloniigas la terenon.

Se oni lasas nomadon agi libere, li simple elektas taŭĝan terpecon, per kiu kultivi malabundan hordeon. Li skrapas, semas, revenas por rikolti, kaj formigras serĉante novan teron. Donu al li arbon, kampon de olivarboj aŭ figarboj, kaj li restas, unue en sia tendo, kaj poste en buda domo de li konstruita. Arbo estas io gardenda kontraŭ detruo, io fleginda; kaj baldaŭ li fariĝas terkultivisto. Estis por mi revelacio, vidi kiel zorge araba ĉefo priatentas la kultivadon, fingrumante la belan teron kaj organizante la laboron de siaj subuloj.

Egiptujo estas, aŭ estis, Nilo ĉirkaŭmura de dezerta ebenaĵo. La tereno irigaciata ampleksas nur 13,000 kvadrat-majlojn el 386,000 kvadrat-mejloj. En la limo de la valo kaj delto troviĝas 20 milionoj personoj—la loĝantaro preskaŭ tri-



Vilaĝo apud Shush : Suda Persujo. Planita forstado.

obligis en la nuna jarcento. La malriĉon kaj suferojn de la terkultivistoj oni devas vidi por ilin kredi. Jen lando, kiu kvintesenice respiegulas la problemon de nutraĵo kaj loĝantaro. Parto de la respondo restos en ŝanĝo de la karaktero de la Nila agrikulturo, sed parto devos esti elkateniĝo el la limigo de la valo, kaj ekspluato de la dezerta fekundeco.

#### Monto Sinai

Taksio N-ro 130 (Suez) faris lastan kuron tra la mallumo kaj skue ekstaris, ĉi-foje ne ĉe la rando de krutegaĵo, sed antaŭ la fortikaĵa muro de la Monakejo de Monto Sinai.

Inaco, la veturigisto, kriis pro triumfo, kaj la dua veturigisto sonigis la avertan kornon. Sed neniu brileto de lumo montriĝis en la fortikaĵa muro. Antaŭ ni ŝajnis malagrabla perspektivo de nokto trapasota en la glacie malvarma vento funelita preter la Roko de la Ora Bovido. Tamen jen el beduena loĝloko ekster la monakejo venis procesio de turbanhavaj figuroj. Ili estis la mahometanaj servistoj de la kristana monakejo, kiuj sukcesis vekti la gastestron. Kun nezorgita barbo kaj netranĉitaj haroj, la gastestro nin bonvenigis.

Palpante nian vojon ĉirkaŭ ŝtonegojn, ni trovis kaŝitan enirejon tra la murego konstruita de la Bizantia Imperiestro Justiniano antaŭ 1,500 jaroj. La sola, alia kontaktilo kun la ekstero estas per korbo mallezata per pulio ĉe la krenelo.

Ni sekvis la gastestran lampon en tunelon tra la dika muro, supren laŭ ŝtuparsimilaj vojetoj tra la monaka urbo ĝis galerio da ĉeloj sur la krenelo, kie ni ĝuis vespermanĝon faritan super kraketanta fajro el tamariskligno.



Jen ni estis, en la fama Monakejo de Sinai, de kie venis la egale fama *Codex Sinaiticus*, nun en la Brita Muzeo. En ĉi tiu sekurejo de monakoj de la Greka Ortodoksa Religio, 1,500 jaraĝa, ni vidis la strangan spektaklon de kristana kampanilo tuj apud mahometana minareto. Jen tero sankta al tri religioj, kiuj ĉiuj agnoskas Moseon—la Hebrea, Kristana kaj Mahometana. Troviĝas akvo en Sinai, sed ĝi ne plu venas el la fama roko, kies kreaĵo nun estas seka.

#### Bagdad

Je tagmezo la suno super Bagdad vualigis kvazaŭ de proverba Londona nebulo. Alruliĝis ŝtormo de polvo subtila kiel ŝminkpudro, portata sur la elsuda vento de tio, kio eble estis la Ĝardeno Edena. Baldaŭ venis pluvo, kaj la polvo fariĝis likva koto falanta el la ĉielo. Estas tre malagrabla, esti superŝutata de elĉiela likva koto, ŝlimo, sur kiu nudpiedaj knaboj faris glitvojon sur la trotuaroj.

Ĉi tiu sablo, kiu troviĝis en mia tagmeza mango en Bagdad, estis la *ventfrotajo* de la tero. Ĝi tute kovris la signojn de primitivaj kaj altnivela Mezopotamiaj kulturoj, kiuj datumas jam de antaŭ 27,000 jaroj. Ĝi bloviĝas de la Persa Golfo trans Sumerion, Ur de la Kaldeoj, kaj Babilonion.

Mi vidis Babilonon, tiun faman civiton, kies sidejo estis malkovrata de Germanaj arkeologoj en la fruaj jaroj de la nuna jarcento. Multon ili forportis al la muzeoj de la okcidento, kaj la restaĵoj fariĝis ŝtonminejo el kiuj oni sisteme forportis konstrumaterialon por modernaj loĝejoj. Hodiaŭ oni povas nur imagi ĝian amplekson kaj imprescon laŭ la ruinaĵoj, kiuj restas.

Interalie mi vidis la lokon, kie mortis Aleksandro la Granda. Lia morto havas aktualan intereson, ĉar li fariĝis viktimo de malario. Kaj same kiel la Moskito venkis lin, ĝi konkeris Babilonon.

Apud Babilono Eŭfrato estas pli alta ol Tigriso. Pli sude la rilataj niveloj inversiĝas. La antikvaj hidraŭlikaj inĝenieroj ekspluatis ĉi tion, kreante kanalojn de unu rivero al la alia. Sed irigacia sistemo estas minaco, se ĝi ne estas konservata en bona ordo. La riveroj parte etendiĝis en marĉojn. Tie multiĝis moskitoj, kiuj aŭ kripligis aŭ mortigis la loĝantojn kun la sekvo, ke la irigaciaj sistemoj ne plu povis esti prizorgataj, kaj finfine la grenkampano de la Antikva Mondo fariĝis sovaĝejo.

La problemo ne estas manko de akvo, sed troo. En plenflujaj periodoj Tigriso inundas la landon kaj la plej grava afero estas regi ĝiajn fluojn. La moderna Irako havas imponajn projektojn por rekrei la riĉan kultivadon. Unu estas ĉe Habanaĵo, kie Eŭfrato povas esti deturnata en lagon, kaj, se okazas superfluo, en la salan platvalon Bahar il Milh. La dolĉa akvo povas esti redirektata laŭ bezono.

Por Tigriso kaj la sudo oni planas eĉ pli imponajn projektojn. La entuta kosto de la projektoj estos proksimume 14 milionoj da pundoj, sumo negranda kompare kun regajno de la antaŭa stato. En la tagoj de Harun-el-Raŝid ĉi tiu tereno subtenis pli ol 30 milionojn da homoj, kaj en Bagdad mem loĝis preskaŭ 2 milionoj. Hodiaŭ la cifero por la tuta lando estas proksimume 5 milionoj.

Per modernaj rimedoj devus esti eble denove realigi la vastajn eblojn de lando, kies pasinta prospero donis al ni la bazon de nia okcidenta kulturo — leĝfaradon, alfabeton, literaturon, filozofion, demokration (Sumerio antaŭis la Grekojn en tio) kaj la matematikon.

(Ĉi tiu estas la tria el kvar artikoloj verkitaj de Ritchie Calder por la Angla ĵurnalo *News Chronicle* en kunlaboro kun Unesco. La resumon kaj tradukon faris E. D. Durrant, U.E.A.-komisiito por Unesco-aferoj. Represon aŭ tradukon de la artikoloj, aŭ partoj de la artikoloj, U.E.A. permesas kondiĉe nur, ke oni indiku la fonton *News Chronicle* kaj *Esperanto*, organon de U.E.A. Pro la du fotoj sur paĝoj 80 kaj 81 ni deziras esprimi nian dankon al la Anglo-Iranian Oil Co. Ltd. (Angla-Irana Oleo-K-ko.). Reprodukto de la fotoj ne estas permesata. Ni esprimas dankon al S-ro Cather en Aleksandrio pro la foto el Egiptujo.—RED.)

#### KIO ESTAS VIA V.K. ?

Kompilas S-ro A. S. Beuker, Bijenhofstr. 34, Leeuwarden, Nederlando.

Divenu la ĝustajn el la signifoj donitaj ĉe la sekvantaj vortoj. Se vi ĝuste elektas ĉiujn, via Vort-Kvociendo (V.K.) estas 100. Tamen deprenu 10 por ĉiu miselekto aŭ nescio.

1. **Animalo** : (a) birdo, (b) besto, (c) bruto ?
2. **Percepti** : (a) ekkoni per la sentumoj, (b) observi, (c) noti ?
3. **Zelo** : (a) fervorulo, (b) besto, (c) esting-iĝinta vulkano ?
4. **Tenti** : (a) malhelpi, (b) provi delogi iun, (c) kanteti ?
5. **Sporada** : (a) ofta, (b) rilata al generado de plantoj, (c) maloftega ?
6. **Babordo** : (a) speco de metalo, (b) antropoida besto, (c) maldekstra flanko de ŝipo ?
7. **Cenotafo** : (a) monumento, (b) speco de arbo, (c) fortikaĵo ?
8. **Fiasko** : (a) veturilo, (b) aro da spikoj, (c) plena malsukceso ?
9. **Faŭko** : (a) speco de planto, (b) buŝejo de bestoj, (c) malbona ordoro ?
10. **Doktrino** : (a) virina diplomito, (b) medikamento, (c) sistema teorio ?

La respondojn vidu sur p. 88.

Lon  
Kongr  
bela ĉ  
en la  
per l  
radio-

Nia  
States  
kelkaj

"K  
malfer  
Esper  
tie ĉi  
Minas  
klopoc  
Nenio  
Gerais  
konsta  
oni po  
popolo  
feliĉor  
la faci  
homo  
mondo  
Tero  
konsta  
li nor  
sampl  
"La  
de la  
instru



Je  
Pedag



# TRA LA MONDO ESPERANTISTA

## BRAZILIO

### Brila Kongreso en Belo Horizonte

Longan brilan programon havis la 12-a Brazila Kongreso de Esperanto en Belo Horizonte, la bela ĉefurbo de ŝtato Minas Gerais. Ĉiuj paroladoj en la Solena Malferma Kunsido estis disradiitaj per longaj kaj mallongaj ondoj de la oficiala radio-stacio de Minas Gerais.

Nia bildo montras la momenton, kiam la Ŝtatestro paroladis. El lia brila parolado ni citas kelkajn pecojn :

“Kun fiero mi ricevis la inviton prezidi la malfermon de la XII-a Brazila Kongreso de Esperanto en ĉi tiu ĉefurbo, kaj plezure mi estas tie ĉi por montri la estimon de la registaro de Minas Gerais al la sindona kaj fruktodona klopodado de la Esperantistoj de nia lando . . . Nenio estas pli kara al la karaktero de Minas Gerais, ol tiu ideo de konkordo kaj harmonio, konstanta aspiro de la koro de ĉiu el ni. Pri ni oni povas diri tion, kion oni jam diris pri alia popolo, nome, ke ni bezonas la tutmondan feliĉon, por senti nin feliĉaj. Precipe nun, kiam la facileco de la transportoj kaj la ĉie-estado de la homo ĉiam pli faras la vastan mondon *unu sola mondo*, ĉia emocio aŭ okazantaĵo, kie ajn sur la Tero ĝi fariĝas, nepre resonas en ni. Hodiaŭ ni konstatas kiel prava estis Eduardo Prado, kiam li nomis la homon, kie ajn tiu naskiĝis, lia *samplanedano*.”

“La Esperantistoj estas entute propagandistoj de la homara konkordo, kaj Esperanto estas instrumento de universala frateco.”



Lia Ŝtatestra Moŝto D-ro Milton Soares de Campos malfermas la kongreson.

### Ekspozicio de lerneja korespondado

Je la fino de marto oni inaŭguris en la ŝtata Pedagogia Muzeo, 29 Rue d'Ulm en Parizo

internacian ekspozicion pri interlerneja korespondado kaj interŝanĝoj. Rimarkindaj estis la sendaĵoj de italaj kaj francaj lernejoj, kun klarigaj tekstoj atentigantaj, ke la materialo estis kolektita per Esperanto. Plendinde estas, ke ne venis multe da materialo el aliaj landoj. Ĉi tiun ekspozicion aranĝis la Internacia Federacio de Lerneja Korespondado kaj Interŝanĝoj, organizaĵo kunlaboranta kun Unesco.

## FRANCUJO

### Internaciaj kaj FERIAJ Kursoj

La asocio de Esperantistaj instruistoj aranĝas internacian ferion kun kursoj en Esperanto okazontan post la 35-a U.K. en Parizo. La ferio daŭros de 13 aŭg. ĝis 2 sept. en ĉarma regiono apud Parizo, en Saint-Germain en Laye. La partoprenantoj estos gastigitaj en liceo. Estas rekomendate partopreni en la tuta periodo el tri semajnoj, tamen eksterlandanoj, kiuj ne povos tiel longe resti, estos akceptataj por du aŭ eventuale por unu semajno. Interesatoj sin turnu al : F-ino J. Dedieu, 3 rue Arzac, Toulouse, Francujo.

### Instruista Jarkunveno

Je 5/6 aprilo la Asocio de Francaj Esperantistaj Instruistoj okazigis sian jarkunvenon en Parizo. Oni pristudis diversajn servojn : korespondservon, eldonon de libroj por lernejoj k.s. Raportoj estis farataj pri spertoj en brita kaj franca somer-lernejoj. S-ro Laurat parolis pri Esperanto kaj la ekonomia strukturo de la mondo.

## GERMANUJO

### Munĥenaj gesamideanoj invitas vin

Al gesamideanoj partoprenontaj la 35-an U.K. en Parizo, kiuj trapasos Munchen, Germanujo, la tieaj gesamideanoj esprimas koran inviton resti kelkan tempon. Por tiuj, kiuj sin anoncos sufiĉe frue la loka grupo faros sian plej eblan por ke ili ĝuu sian restadon en la bela kaj agrabla bavara ĉefurbo. Laŭ ebleco oni aranĝos komunan karavanon al Parizo.

La samo validas pri gesamideanoj, kiuj iras al Oberammergau por la fama *Pasio-dramo*. Interesatoj sin turnu al : Esperanto-grupo "Laboro", Restoracio Zirnkieble, Gärtnerplatz, (13b) München.

## HUNGARUJO

### Zamenhof-memorifesto

En la hungara urbo Hódmezővásárhely la lokaj Esperantistoj aranĝis Zamenhofan Feston 17-an de aprilo. Partoprenis ankaŭ samideanoj de najbaraj urboj. Evidentas, ke la provincaj samideanoj estas nunmomente iom pli viglaj ol en la ĉefurbo,



**MAROKO****Interesa iniciato en Maroko**

La Peranto de U.E.A. en Maroko skribis al la P.T.T.-administracio en Rabat kun la peto, ke post lia nomo kaj adreso en la telefonlibro troviĝu la vortoj: "Peranto de U.E.A. por Maroko". Krom la informa valoro de tia anonco, oni devas rekoni ankaŭ la propagandan, kaj estas tial konsilinde, ke pluraj delegitoj kun telefono simile klopodu ĉe sia instanco.

**NEDERLANDO****Internaciaj Somer-Kursoj**

Pro la sukcesoj de la Someraj Kursoj en 1949, la Asocioj L.E.E.N. kaj Flandra Ligo Esperantista denove organizas tiajn kursojn en 1950 en Arnhem. Kursgvidantoj estos: S-ino A. M. v.d. Wal-Brethouwer, D-ro Th. v. Gindertaelen, S-ro A. Weide (Germanujo) kaj S-ro C. B. Zondervan. En la vesperoj okazos pluraj prelegoj ĉe kiuj parolos interalie F-ino A. D. Tusveld, S-ino R. Köhler, kaj D-ro W. J. A. Manders. Krom tio oni disponigos multajn distraĵojn, muzikaĵojn k.s. Senpagan prospekton oni povas ricevi de: S-ro C. B. Zondervan, Sweelinckstraat 2, DEVENTER, Nederlando.

**Kongreso de L.E.E.N. en Groningen**

La jarkunveno kaj kongreso de *La Estonto Estas Nia* okazis je Pasko en Groningen. Pli ol 200 samideanoj partoprenis kun gastoj el Belgujo, Britujo kaj Danlando. La urbestro aranĝis akcepton de la kongresanoj. La kutima programo de la kongreso evoluis kontentige kaj el la raportoj oni eksciis la gravan fakton, ke en kelkaj porinstruistaj lernejoj okazos kursoj pri Esperanto.

Protestanta diservo kun prediko de Pastro van der Meyden okazis en la dimanĉo. Oni elektis novan prezidanton en la persono de S-ro Blokker, kiu en la fino de la kongreso esprimis varman dankon al la Groningen-anoj pro la sukcesa aranĝado.

**SUD-AFRIKO****Unuafoja instruo de Esperanto en publika institucio**

Post multa klopodado FD. de U.E.A. S-ro F. Woolf en Port Elizabeth, Sud-Afriko sukcesis varbi la intereson de la edukaj instancoj por permesi instruon de Esperanto en la tiea Teknika Lernejo. Malgraŭ malforto de la movado tie, nia reprezentanto multe laboris kaj li estas des pli gratulinda pro la sukceso atingita, ĉar tiu iniciato verŝajne estas la unua oficiala tiuspeca apogo de la Internacia Lingvo en Sud-Afriko.

**GRAVA OFICO EN UNESKO****OKUPITA DE EMINENTA EDUKISTO  
KAJ SAMIDEANO**

ELEKTO DE H. L. ELVIN

Ni ĝojas konigi al la internacia publiko la gravan postenigon de samideano nia, S-ro Herbert Lionel Elvin, al la ofico de Direktoro de la Eduka Fako de Unesco.

Naskita en 1905, S-ro Elvin studis en Altlernejo Southend. Post finstudo en Kolegio Trinity Hall, Kembriĝo, li fariĝis Fratulo de Universitato Yale en Usono. Posta honoro estis Fratulo de Trinity Hall, Kembriĝo. Dum la milito S-ro Elvin fariĝis oficisto en la Aviad-Ministerio kaj poste en la Ministerio por Informoj.

En 1945 li atingis la gravan sukceson, fariĝi Estro de Kolegio Ruskin en Oksfordo (populare nomita la *Laborista Kolegio*) kaj restis en tiu posteno ĝis la nuna elekto.

En la angla lingvo li verkis *Men of America* (Homoj de Ameriko) kaj la Esperantistaro konas lin sur la literatura tereno per lia traduko en Esperanto *El la skizlibro* (Washington Irving) en la serio *Internacia Mondliteraturo*, eldonita de la grava germana firmo Fred. Hirt & Filo en la intermilitaj jaroj.

Nome de U.E.A. la sekretario jam direktis al S-ro Elvin gratulojn, kaj ni estas certaj, ke la bondeziroj de niaj legantoj iros al nia samideano kun espero pri sukceso en la nova sfero.

M.S.

(Al niaj fervoraj samideanoj ni deziras konsili prudenton en la personaj esprimoj de gratulo. Dum ankoraŭ kelka tempo S-ro Elvin estos treege okupita kaj certe ne povos respondi al leteroj. Krome, estas menciinde, ke oni ne atendu miraklojn de nia kolego en la kadro de Unesco.—RED.)

**SVISLANDO****Ferio-semajno en Svislando**

Svisa Esperanto-Societo aranĝos ankaŭ ĉi-jare Esperantistan Ferio-semajnon en la ĉarma regiono de la urbeto Huttwill. Tiu renkontiĝo okazos de 24-a de julio ĝis 2-a de aŭgusto 1950. La prezoj estas malaltaj kompare kun la bonega manĝado kaj agrabla restado, kaj estas po 9 fr. por tago. La partoprenontoj de la 35-a U.K. en Parizo havos la okazon, post la ferio-semajno pasigi du tagojn en la bela urbo Basel, kie la loka Esperantistaro aranĝos antaŭkongreseton.

Eksterlandanoj estas kore bonvenaj. Eluzu la favoran okazon kaj venu al Svislando. Dum unu tago ni antaŭvidas ekskurson en la alpan centron de nia lando. Por informoj kaj aliĝoj oni sin turnu al: Svisa Esperanto-Societo, Küngenmatt 31, Zürich 55.

Adre  
Poŝt  
Univer  
Aliĝ  
Gejun  
Nom  
el 34 l  
Ĝen  
zorgis  
la labo  
estas p  
la res  
sekcioj  
1-a  
2-a  
3-a  
4-a  
Je  
prezid  
raport  
kaj ra  
la est  
raport  
Unive  
konce  
kiu es  
la lab  
amfite  
Lita  
Litera  
dum la  
verkis  
manus  
admir  
Konk  
Ni  
nume  
legi si  
perso  
Dis  
precie  
organ  
En  
vespe  
kies p  
Du  
aktor



**35-a UNIVERSALA KONGRESO**  
de  
**ESPERANTO**

Parizo, 5-12 aŭg. 1950

Adreso : 62 Avenue de Clichy, Paris 18.

Poŝta ĉekkonto : N-ro 3208-57 Paris, 35-a  
Universala Kongreso de Esperanto.

Aliĝkoto : 2,000 fr. ; Edzino 1,000 fr. ;  
Gejunuloj malpli ol 20-jaraj, 500 fr.

Nombro de Kongresanoj : (ĝis 29 aprilo) 1770  
el 34 landoj.

**Ĝeneralaj kunsidoj** : La Komitato de U.E.A. zorgis precizigi la manieron, laŭ kiu estos preparata la laboro de la kvar sekcioj. La Landaj Asocioj estas petataj prezenti raportojn pri la situacio en la respektivaj landoj aŭ fakoj por la diversaj sekcioj. Prezidos tiujn sekciojn :

- 1-a sekcio : *Esperanto en Lernejoj* :  
S-ro Kennedy
- 2-a sekcio : *Internacia Trafiko kaj Komerco* :  
S-ro Petit.
- 3-a sekcio : *Sciencoj kaj Teknikoj* :  
D-ro Lapenna
- 4-a sekcio : *Intelektaj Interŝanĝoj* :  
Generalo Bastien.

Je la komenco de la ĝeneralaj kunsidoj la prezidantoj de sekcioj prezentos enkondukan raporton pri sia fako. Okazos ĝenerala diskutado, kaj raportantoj prezentos koncizajn raportojn al la estraro de U.E.A. Tiu, post kunigo de tiuj raportoj, prezentos ilin al Voĉdonado al la Universala Kongreso por efektivigo de la koncernaj proponoj. La ĝenerala kunsido, dum kiu estos alprenitaj la finaj decidoj kiuj resumos la laboron de la sekcioj, okazos en la granda amfiteatro de Sorbono.

**Literatura Konkurso** : Ni memorigas, ke Literatura Konkurso, dotita je premioj, okazos dum la U.K. Tiu provo celas konigi ne konatajn verkistojn, kiuj ĝis nun ne povis publikigi siajn manuskriptojn, tamen legindajn kaj eble admirindajn. Ni memorigas same pri la Oratora Konkurso.

Ni volas aldoni al la Regularo en la aprila numero : "La konkursantoj, kiuj ne deziras mem legi siajn verkojn, povas komisi pri legado aliajn personojn."

**Distraĵoj** : Ni povas doni kelkajn pliajn precizaĵojn pri la distraĵaj vesperoj kiuj estos organizitaj dum la kongreso.

En la kadro de la kongreso okazos ĵaŭdon vespere, prezentado, senpaga por la kongresanoj, kies programo enhavas filmojn.

Due, S-ro Raymond Schwartz, kun profesiaj aktoroj, prezentos ekster la kadro de la kongreso



*Avenue de Champs Elysées, Parizo*

(ĉar tiaj prezentadoj ne devas esti ĝenataj de ia ajn oficialeco) kabaretajn fantaziaĵojn. S-ro Schwartz, kiu efektive estas lingva akrobato, ne bezonas esti konigata al la Esperantista publiko. Oni povas diri pri li, ke li estas simbolo mem de la gaja humoro.

**Transportoj** : La rabatiloj por la kongresanoj individue vojaĝantaj estos sendataj kun la 3-a Oficiala Bulteno. Antaŭ ol prezenti ilin al la fervoja administracio, oni devos skribi sur ilin siajn nomon kaj adreson.

**Ekskursoj** : Ĉiuj kongresanoj estas informitaj pri la programo de la tri postkongresaj ekskursoj. Ni diru pri ili nur, ke la prezoj estas kalkulitaj konsente kun la Servo de la Nacia Edukado laŭ la plej malalta tarifo ebla. La kosto de la transporto, kiu estos farata per komfortaj aŭtobusoj, estas fiksita laŭ la tarifo de la tria klaso de la francaj fervojoj, sen ia ajn aldono. La prezo de la tranoktoj, de la tri manĝoj, kaj de la enir- kaj serv-monoj ne superos 650 fr. por ĉiu tago. La tuto atingos nur duonon de la kutima prezo por tiaj vojaĝoj, ĉar la vojaĝantoj kuŝigos kaj manĝos en kunrestejoj.

**Akceptoj** : Ĉiuj kongresanoj estos akceptitaj en la Pariza urbdomo la merkredon 9 aŭg. je la 11-30 horo.

Ĉiuj krome estos samtage akceptitaj por senpaga teo kun kukoj en la fama Pariza Magazeno *Galeries Lafayette* merkredon 9 aŭg. je 17.00 h.

**Grave!** Bonvolu noti, ke L.K.K. ne akceptos kongreskotizojn post fino de junio.



## TRA LA LIBRARO

\*—akireblaj ĉe U.E.A.



**\*Burĝonoj** de Vilho Setälä. Infanoj en poezio kaj fotografo. Eld. Eldono Vilho Setälä, Helsinko. 29.5 × 21 cm., 80 paĝoj, kartonita kun tola

spino. Prezo 15 ŝil., afranko 6p.

La praktikantoj de la fotografio devis longe atendi antaŭ ol trafi rekonon sur la tereno de la arto, sed malgraŭ kelka kontraŭstaro en iuj artistaj medioj, la publika nun jam akceptas gravan distingon inter nura kompetento fidele reprodukti optike, kaj kreo de bildo en kiu ĉiel imponas la stampo de subjektiva pritrakto pri lumo kaj ombro. La fotografo, kiu aplikas ĉiujn teknikajn konojn al sia fako, sendube estas lerta metiisto; sed kiu rigardas tra la lenso de la kamero al la mondo de materiaj objektoj kaj strebas al kapto de la metafizikaj kvalitoj, kiuj kvazaŭ animas kaj sublimigas la por la laiko senvivajn objektojn, tiu estas artisto.

Trafojado de kiu ajn fot-arta verko rivelas la amplekson de la arto kaj konigas al ni—tiom kiam kapablas percepti—la preskaŭ geniajn atingojn kaj ne malpli geniajn konceptojn de la homoj, kies materialoj estas la efemeraj kvalitoj de lumo. Mi memoras, ke antaŭ multaj jaroj mi, kiel novbakita foto-amatoro (mi timas, ke mi restas en la vicoj de la ĉiamaj komencantoj en tiu fako!) demandis spertan kolegon pri la maniero fotografi sunlumon. Li respondis per retorika demando: Kiel vi vidas sunlumon? kaj tuj aldonis: Oni vidas lumon nur per ombro! Tiu kvazaŭ-sentenca teknika difino havas la karakteron de eterna vero. En la momento, kiam oni ekkonscias la fakton, ĝi ekgrandegas antaŭ nia konscio kaj prilumas nian ekziston kaj ni sentas malpezigon de la spirito, kiel okazas kiam al ni estas subite rivelita io antaŭe nur obtuze kaj neklare komprenata. Tiu sentenco povus servi kiel profunde morala admono por la homo, ĉar nur tiu kiu konas la ombron, plej scias ŝati la lumon. . . . Kaj povas esti, ke tiuj kiuj ne ĝuas la benon de propraj infanoj, plej scios ŝati kaj taksu la valoron de ĉi tiu unika kaj belega verko, kiun al la Esperanta publiko donis Eldono Vilho Setälä.

Por la esprimo de sia arto, la lum-artistoj V. Setälä kaj Arja Kaartotie-Setälä elektis temon ravan kaj samtempe universalan. Kia feliĉa genio, kiu instigis ilin prunti el la planta fako terminon kiu—samtempe priskriba kaj simbola—ekscitas la imagon pri la mil facetoj de la infana vivo! Kie estas le gepatroj, kiuj en ĉi tiuj paĝoj ne trovos ion propran, ion en sia privata trezorejo

de memoroj, memoroj karaj, el la intimo de la hejma vivo, *kiam la mondo estis juna* por citi la poeton?

Kiel prave diras la kompilinto en la antaŭparolo:

“Infano antaŭ kamero—rava renkonto, riĉa kiel la sorto mem. Krea, kiel la renkonto de poeto kun infano. En la etulo burĝonas la semo al ĉio homa. . . . Kaj vi, malantaŭ la kamero, tremas pro postulema tasko: trovi ĉion tion kaj ekkapti ĝin je la ĝusta momento, aŭ ĉu perdi ĝin sub la kaŝantan ŝelon de la vivo?”

Per pli ol sepdek fotoj grandformataj, la fotistoj kaptis pli ol tiom da nuancoj de la elvolviganta vivo; en la lulilo, sur kusenoj, ride, malride, ĉe la marstrando. Kaj kiu ne rekonas la universalan pozon reprezentitan per la foto sur la fronta kovril-paĝo de ĉi tiu numero de *Esperanto*?

Eblas jam nun aŭdi la esprimojn de raviĝo flanke de admirantoj, kiuj je ĉiu turno de la paĝo malkovros novajn belojn.

Malgraŭ la grandaj meritoj de la bildoj, estus ja domage se ili altirus la atenton de la rigardanto tiom, ke li neglektus la versaĵojn, kiuj troviĝas sur preskaŭ ĉiu paĝo. Estus malfacile imagi pli harmonian kunigon de du artformoj, ĉar ĉiu perfekte komplementigas la alian. Je unu trarigardo oni deklaras, ke la versaĵoj estis faritaj por la bildoj; sed je nova kontrolo oni sentas egalan eerton, ke la bildoj estis kreitaj por la poemoj. La poemojn tradukis el la finna lingvo J. E. Leppäkoski kaj Vilho Setälä. Kiu dubas pri la muziko de Esperanta poezio, legu kaj deklamu *Laŭdu Morgaŭ Ĉevalidon* (p. 30), kaj iujn aliajn el ĉi tiu bela kolekto. Profunde kortuŝa estas *Sur Pilkokampo* priskribo de knabo kripla ĉe ludkampo.

El la fotoj, kelkaj estas elstaraj laŭ teknikoj vidpunktoj, precipe pro la klopodoj fotografi fronte al la lumo (19, 20, 50, 64, 65). Iuj fotografoj tamen certe esprimos dubon pri la eble troa amplifado (ĉe p. 27)—por akiri stompan efekton—kiu donas iom nekonvenan malklaron de konturoj kaj emfazas la konsiston de la filmo, krom se oni rigardis ĝin de kelka distanco; sed ja temas pri libro, ne pri surmura bildo! La bildo sur p. 24-45 estas eksperimento—dube sukcesa—je kapto de la spirito de moviĝo.

Oni povas tamen nur esprimi gratulon kaj dankon al la eldonejo kiu jam per siaj nemultaj eldonoj demonstraciis sian konscion pri la alta kultura rolo de la Lingvo Internacia. Nepre havinda verko. M.S.

**\*Jarlibro de U.E.A. 1950. Unua parto.** 15 × 11.5 cm. 248 paĝoj. Neaĉetebla, sed liveribla al individuaj membroj. Eld. U.E.A. Heronsgate, Rickmansworth, Anglujo.

Kiel  
kaj alis  
malfaci  
nombro  
la Ant  
kreskis  
Statist  
16,350

Nov  
publik  
lastaj  
oni ĝi  
preferu  
kaj me  
grava  
Krom  
liston  
certe p  
labirin  
(kama  
Sinjon  
Skribo  
do ni  
s-ro k  
(ingen  
Ceta  
pli be  
enhav  
espera

\*AJ  
bildoj  
Publis  
12.5 c  
1 ŝil. p

Off  
porint  
pri la  
kara  
simila  
infanc  
pli ri  
volas  
infanc  
komp  
oni po

Ku  
libret  
opinie  
taŭge  
kaj  
penso  
amiko  
konst  
instru  
keloni



Kiel kutime la Jarlibro konsistas el adresara kaj alispeca enhavo. Ĉar pri la adresara parto estas malfacile diri ion novan, ni mencias nur, ke la nombro da delegitoj nun estas 1949, kaj ke laŭ la *Antaŭparolo*, la membraro en la pasinta jaro kreskis je 6%. Ĝi atingis la nombron 18749. Statistiko pri la Petskribo montras ke kolektiĝis 16,350,212 subskriboj, el kiuj 895,432 individuaj.

Nova kaj rekomendinda aranĝo estas la publikigo de listo de literaturo aperinta en la lastaj du jaroj. Se tia listo aperus ĉiujare kaj oni ĝin iom kompletigus kaj perfektigus (mi preferus ordigon laŭ temoj kaj laŭ aŭtoraj nomoj, kaj mencion pri formato kaj eldonjaro), tio estus grava gajno por la dokumenta fako de nia movado. Krom ĉi tiu bibliografio la Jarlibro enhavas liston de mallongigoj, kiu estas sufiĉe detala kaj certe povas utili al iuj, kiuj perdis la vojon en la labirinto de mallongigoj. Tamen mankas: k-do (kamarado), Est. (Estimata), E.S. (Estimata Sinjoro), K.K. (Kara Kamarado), P.S. (Posta Skribo), N.B. (Notu Bone). Inter krampoj, kial do ni ne mallongigas laŭ unueca sistemo? Kial s-ro kaj d-ro kaj ne p-ro (profesoro) kaj i-ro (inĝeniero)?

Cetere la Jarlibro distingiĝas de la antaŭaj per pli belaj papero kaj bindo, kaj pro sia valora enhavo prezentas utilan eldonajon por ĉiu esperantisto.

G.P. de B.

**\*ABC-Libro:** strofoj de Nenjo Rimanto; bildoj de Brian Leslie. Eld. The Esperanto Publishing Company, Ltd.; kartonita 20 × 12.5 cm., 12-paĝa, kovriloj krome uzataj. Prezo 1ŝil. plus 1p. afranko aŭ 4 rpk.

Ofte kiam mi rigardis la amason da nacilingvaj porinfanaj bildlibroj riĉe koloritaj, mi iom hontis pri la rolo de malriĉa kuzo, kiun devas ludi nia kara internacia lingvo en ĉi tiu rilato. Iom simila al la sento, kiun oni spertas se la propra infano sopire rigardas la belajn ludilojn de la pli riĉaj samaĝuloj, sed mem ne havas. Mi volas montri al la mondo, inkluzive de miaj infanoj, ke Esperanto estas grava afero, tute komparebla kun la nacia lingvo. Sed ne multon oni povas proponi al ĉi tiuj plej-junuloj.

Kun ĝojo tre vera do mi ekrigardis ĉi tiun novan libreton kaj fiere montris al mia infaneto. Mi opinias nur malmultaj esprimoj dubindaj laŭ taŭgeco: "laŭ homa elekto" estas iom abstrakta, kaj "fiŝkaptistaro" eble tro komplika kunmeto de pensoj por la tre juna menso. Kredeble "hundo, amiko konstanta" estus pli komprenebla ol "besto konstanta". Ĉu *helonio* taŭgas por prezenti instrue la literon *h*, kiam jam pli oftigis la formo *helonio*?

(daŭrigo en sekvanta holono)



## NIA FORUMO

PAROLAS LA LEGANTOJ

Aŭtoro James D. Sayers  
kolektive respondas

Al la arego da gesamideanoj, kiuj ĝis nun skribis al mi, post tralego de *Invito al ĉielo*, mi tute ne havas la tempon nek la forton respondi individue. Mi petas la favoron de loko en *Esperanto* por respondi, por ke ĉiuj havu kune mian respondon. Krome, la demandoj plej intime koncernas homaran universalismon, kiu miaopinie, estas la bazangulŝtono de nia Esperantismo.

Verŝajne multaj akiris mian malnovan adreson de la U.E.A.-kongresadreso. Rezulte, mia antaŭa oficejo en Frankfurto estis iom ĝenata plusendante la leterojn. Aŭtune 1949 mi revenis al mia verkadlaboro en mia hejmo en Usono.

Al la multaj, kiuj, plej dolorige al mi, miskomprenis la klarigojn en *Invito al ĉielo* pri la rasa miksaĵo, mi respondas jene: Ili mistrakis la kernon se ili kredas, kiel multaj el ili esprimis sin, ke mi malamas iun kategorion de la homaro pro la enhavo de sango de la *filoj de la tero*. Se tiu akuzo estus de mi pravigita, mi devus malami eble la tutan homaron. Mi nur mistike donis la klarigon pri la disfalo de la *Di-gefiloj* por lumigi la pravigon pri la ofero de la *Instruisto*. Tiu ofero estas por la plena celo relevi la falintan homaron el la *Egiptujo de sia disfalo* por repurigi ilin. Relevite, la homoj povos pli plene ĝui la perfektecon, ol estus eble se ili ne estus travivintaj la angorojn de la malam-plena malperfekteco. KREDU MEN, MI MALAMAS NUR LA MALBONON, SED NE LA KOMPATINDAJN HOMAJN VIKTIMOJN DE LA MALBONO.

Plue, mi opinias, ke la instruado al la homaro pri la bono kaj la malbono ne estus eble, sen homoj, kiuj agas kiel iloj por efektiviĝi bonon aŭ malbonon. Tial tiuj homoj, kiuj necese devas esti iloj por la plenumo de la malbono, estas plej kompatindaj pro ilia blindeco pri la bono. Se tia kredo estas Antaŭ-destinismo—kiel sugestas S-ro Dinwoodie en sia recenzo—mi akceptas la akuzon. (Mi tutkore dankas Samideanon Dinwoodie pro lia tre komprenema recenzo).

La fortikeco de la paĝoj estas prudenta antaŭzorgo kaj la tre elstaraj bildoj havas pli interesan aspekton pro la diverskolora inko uzita. Preso tre klara kaj konvena.

La kritiketoj varios laŭ la aĝo de la koncerna infano. Sed rigardante la verketon de pluraj vidpunktoj, mi opinias, ke ĝi tre utilos por diversaĝa infanaro. Gratulon al E.P.C. pro la konsidero donita al niaj Esperantistetoj.

Eric Reville.



Rilate la akuzojn, ke mi atakas la ekleziojn, mi povas respondi nur, ke oni tro rapide legis la libron. Mi nur sekvis la imitindan ekzemplon de Kristo mem, kiam mi malfavore diskutigas, pere de la geroluloj, la anim-mortigan formalismon. Eĉ antaŭ ol Kristo, la hebreaĵ profetoj, kiel ankaŭ la Pra-Budhismo kaj, pli frue, Zoroastro, kondamnis la spirit-mortigan pompan formalismon de la profesiaj, tro mondamentaj pastroj, kiuj pli amis la mondan riĉon kaj povon, ol la humilan spiriton de kompato kaj amo por siaj kunhomoj.

Ne nur inter la ekleziuloj videblas tiu malvarmiga formalismo. Dum miaj lastaj jaroj en Anglujo kaj Eŭropo mi ofte rimarkis la kulturitan sinretenemon de la plenaĝuloj, kiu ofte impresas Usonanon aŭ Kanadanon kvazaŭ ĝi estus malamo kontraŭ ĉiu fremdulo. Kontraŭe, la infanoj, antaŭ la edukado al la formala sinretenemo, tuj elmontras amikemon al fremduloj. Mia deziro estas, ke ĉiu homo estu pli natura, malpli suspektema, pli tolerema kaj malpli antaŭjuĝema en la rilatoj kun siaj kunhomoj. Mi rimarkis tian naturan, amikeman spiriton en Esperanto-rondoj en Eŭropo, precipe en la mondkongresoj.

Se oni povos montri al mi en *Invito al Ĉielo* iun ajn vorton aŭ frazon, kiu plej malforte indikas miaparte malamon, eĉ etan malestimon kontraŭ iu ajn kategorio de homoj, bonvolu indiki tion al mi (per la eldonejo), kaj en la venonta dua eldono mi forigos ĝin, kiel mi forbatus venenan serpenton.

Mi profunde kredas, ke la Zamenhofa Homaranismo, kiun sentas ĉiu vera Esperantisto, estas alta nobla etiko. Tiu homo, kiu lernas plej perfekte paroli, kompreni kaj verki per Esperanto, sed forĵetas la Zamenhofan Homaranismon, estas parenca al papago, kiu lernas krii: *Mi amas vin!* nekomprenante la signifon de la vortoj.

### Laŭdo

En la lastaj tagoj mi ricevis la Jarlibron (Unua Parto). Kun granda intereso mi ĝin trafolumis kaj tra legis, kaj mi estas kun ĝi kaj kun la gazeto *Esperanto* tre kontenta.

Pro tio mi sentas, ke estas mia devo danki al vi, je via granda laboro por nia Esperanta movado.

Persistu en via laboro, nia movado jam venkas kaj certe venkos. Mi deziras al vi en via estonta laboro multajn sukcesojn.

*Vlad. Dvořáček, Hradec Kralove, ĈSR.*

(La sekretario kaj la redakcio sentas grandan kuraĝigon el tiaj leteroj, de kiuj ni ricevis plurajn. Kun la konstanta kaj lojala subteno de la gesamideanaro, ni povos liveri eĉ pli bonajn servojn kaj plibonigi nian internacian revuon).

**ATENTU!** Tuj antaŭ, tuj post kaj dum la Kongreso en Parizo la Sekretario estos for de la Centra Oficejo. **Bonvolu ne skribi al Heronsgate dum tiu periodo.** Dankon.

### PROF. D-RO LAPENNA EN BRITUJO

Tuj post la kunsido de la Estraro Prof. D-ro Ivo Lapenna komencis sian rondvojaĝon tra Britujo. Laŭ la ricevitaĵ informoj li vizitis entute 21 grandajn anglajn kaj skotajn urbojn, en kiuj li faris 25 publikajn prelegojn kaj 17 paroladojn en Esperanto-grupoj. Miloj da aŭdiencoj kaj invitiloj altiris al aranĝoj grandan publikon. En la gazetoj aperis ĉ. 80 diversaj artikoloj kaj anoncoj, dum la brita radio kvarfoje informis en la regulaj anglalingvaj elsendoj pri la diversaj prelegoj, lekcioj kaj aliaj aranĝoj. La speciala komisiito de Universala Esperanto-Asocio estis akceptita de dek Lordoj-Urbestroj kaj Urbestroj. En Newcastle la Lordo-Urbestro oficiale salutis D-ron Lapenna dum kunsido de la urba konsilantaro, kiun ĉeestis sepdeko da konsilantoj, multnombra publiko kaj la gazetaj raportistoj. Prof. Lapenna respondis per mallonga paroladeto en Esperanto—la unua Esperanta paroladeto farita dum oficiala kunsido de urba konsilantaro en Britujo!

D-ro Lapenna vizitis multajn edukajn aŭtoritatojn, lernejojn, sciencajn institutojn kaj universitatojn. En kelkaj universitatoj okazis prelegoj pri diversaj temoj koncernantaj la internacian publikan juron. Dum sia vojaĝo la komisiito de U.E.A. kontaktis entute ĉ. 200 personojn el publika vivo.

La rapida vojaĝo de D-ro Lapenna tra Britujo estis vere grandega sukceso. Proksimume 700,000 personoj estis informitaj rekte aŭ malrekte (pere de gazetartikoloj kaj radio) pri nia afero. En la julia numero de *Esperanto* ni publikigos artikolon de D-ro Lapenna pri liaj impresoj el Britujo.

### KIO ESTAS VIA V.K. P (vidu p. 82)

#### Respondoj

1. (b) **Animalo** estas precipe zoologia termino signifanta beston aŭ vivantan estaĵon, sed ne vegetaĵon.
2. (a) **Percepti** signifas ekkoni la eksteran mondon per niaj kvin sentumoj.
3. (a) **Zeloto** estas fervora adepto de ia doktrino aŭ religio.
4. (b) **Tenti** signifas, provi delogi iun de la virta vojo.
5. (c) **Sporada** signifas tre malofte okazanta.
6. (c) **Babordo** estas la maldekstra flanko de ŝipo, kiam oni frontas al la antaŭo.
7. (a) **Cenotafo** estas monumento starigita por memorigi fama(j)n mortinto(j)n.
8. (c) **Fiasko** estas plena malsukceso.
9. (b) **Faŭko** estas buŝejo de besto (uzata ankaŭ figure, *faŭko de kanono*).
10. (c) **Doktrino** estas aro da principoj kaj sistema teorio de filozofio aŭ scienco.

La ankora  
ĉe reg  
transfo  
laŭ la

La t  
rolita  
malko  
muntis  
realism  
urbo V  
la tut  
veturi  
trapas  
nekon  
pli va  
krei n  
paŝis  
defenc  
iluzii  
fonon  
arta f

En  
la ĉi-s  
de la  
loĝan  
tamen  
traŝvo  
Kaj c  
ĝis nu  
dram

Ali  
kome  
scene  
oni g  
fonaj  
rekvi  
tio c  
mult  
scene  
suko  
beda  
dilige  
ŝovir  
el la

Se  
ŝeks  
solvi  
laŭd  
inter  
kadr  
fono  
prof  
trov



Reto Rossetti :

**FILMIGO DE DRAMO**

La problemo filmigi la dramojn de Ŝekspir ankoraŭ ne estas sukcese solvita. Ĝis nun mankis ĉe reĝisoroj tia imagpovo potenca kaj intense transformiga, kiu refandus tiujn grandajn dramojn laŭ la apartaj ecoj de la filmtekniko.

La filmo de *Romeo kaj Julieta* estis eminente rolita kaj la poezio bele elparolita, sed unu grava malkonsekvenco fuŝis la tutajn. La reĝisoro muntis, kiel kadron por tiu drama poezio, tute realisma (laŭ Holivuda koncepto) donon de urbo Verona en la 15-a jarcento. Prezentita estis la tuta trafiko de la urbaj stratoj, kun azenoj, veturiloj, burĝoj, nobeloj kaj popolanoj en kirla trapaso—kaj kontraŭ tiu realisma fono sonoris **nekonvene** la drama poezio. Do tie oni uzis la pli vastajn prezenteblojn de la kino ĝuste por krei maltrafan, malharmonian efekton. Oni do paŝis en eraron, de kiu la scenejo mem estas defendita, ĉar neniam la scenejaj rekvizitoj\* povas iluzii la realon, sed devas—feliĉe—prezenti la fonon per ia konvencio, kiu pli harmonias kun la arta formo de la dramo.

En pli frua filmo *La Sonĝo de Somermeza Nokto* la ĉi-supra eraro estis evitita per la nepra malrealo de la lunarbaraj scenoj kun ties elfa kaj fea loĝantaro. Tie la reĝisoro havis kvankam subtilan, tamen netrompan taskon : krei lunsorĉan fonon traŝvebatan kaj tradancatan de diafanaj fe-estafoj. Kaj oni tre bone sukcesis tiel, ke ĉi tiu filmo estas ĝis nun verŝajne la plej integra filmigo de Ŝekspira dramo.

Alian solvon provis ĉe *Henriko V-a*. Tie oni komencis per rekta rekonstruo de la Ŝekspira scenejo kaj la ekludo tie de la dramo, kaj de tio oni grade kaj tre bele forportiĝis al scenoj, kie la fonaj konstruaĵoj estis ĉarma kompromiso inter rekvizitoj kaj naivaj mezepokaj desegnoj, kaj de tio oni iom stompigis al fono realisma, sed multloke reĥanta ankoraŭ la pitoreskon de sceneja prezentado. Tiu koncepto estis tute sukcesa kaj cetera adekvata al la dramo. Mi bedaŭras nur, ke oni koncentris tiom da gusto kaj diligento ĝuste pri *Henriko V-a*, kiu, kiel bombasta ŝovinisma fanfaro, estas miaopinie la plej malbona el la historiaj dramoj de Ŝekspir.

Sed ankoraŭ la problemo : kiel filmigi grandan Ŝekspir-dramon, ekzemple tragedion, restis nesolvita. Kaj tiam sekvis *Hamleto*. Oni ĝin multe laŭdis, kaj efektive ĝi estis laŭdinda kaj tre interesa per la kuraĝa kaj originala elŝiriĝo el la kadro de la teatro, per la inkuba drameco de la fono kaj la dinamiko de la fotiloj ruliĝantaj tra la profundaj koridoroj de Elsinoro. Tamen mi trovis ĝin nur plua interesa fiasko. Ne nur la

\* rekvizitoj = scenejaj akcesoraĵoj.

rolado de Olivier estis tro bridita (mi opinias, ke al la patoso de versoj devas konformi patoso de gestoj kaj mienoj) ; ne nur oni forĵetis la timige sonorajn versojn de la fantomo (laŭ kaprica interpreto la fantomo estis disfluanta miraĝo el la nebulo kaj ĝiaj vortoj obtuza, klake eĥanta duonparolo, kvazaŭ cerbiluzio de Hamleto mem), sed entute mankis ankoraŭ tiu potenca fantazio, krea kaj transformiga, kiu redonus al ni la Ŝekspir-dramon en intensa kaj intima interpreto.

Kiam oni faris el Hamleto baletan, oni ja devis fari tiun heroan streĉon, kiu tradukas la dramon laŭ rimedoj de nova, funde malsimila arto. Sed ankoraŭ niaj filmreĝisoroj falas en la kaptilon de la ŝajna simileco inter scenejo kaj filmo, kaj tial neniu povis ĝis nun fari la grandan forsulton, kiu venigus lin pli **proksimen** al la esenco de la originalo laŭ filma tekniko.

Analoge al ĉi-komparo inter baletigo kaj filmigo de Ŝekspir ; estas ankaŭ pli facile traduki Ŝekspiran verkon en armenan aŭ jugoslavan lingvon, ol traduki ĝin en la modernan anglan lingvon (tasko ŝajne tute facila, sed en efektivo treege malfacila, ĉar ĝi tro similas).

**INTERNACIA KONKURSO 1950**

La tabelo indikas la staton je la fino de aprilo. Oni rimarkas, ke Maroko estas nun ĉe la supro kaj ni gratulas al la tieaj laborantoj. Multaj aliaj landoj faris bonan progreson, kaj ŝajnas esti bona ebleco ke la granda plimulto atingos siajn kvotojn. Helpu en la konkurso per la varbo de viaj amikoj !

Lando	Kvoto	Poentoj	%
1. Maroko ..	250	380	152.0
2. Hispanujo ..	600	840	140.0
3. Izraelo ..	250	270	108.0
4. Urugvajo ..	250	260	104.0
5. Finnlando ..	1800	1790	99.5
6. Belgujo ..	2000	1937	96.8
7. Aŭstralio ..	900	855	95.0
8. Svislando ..	1300	1235	95.0
9. Sud-Afriko ..	250	235	94.0
10. Germanujo ..	2000	1870	93.5
11. Svedlando ..	4900	4430	90.4
12. Danlando ..	3100	2725	88.0
13. Brazilo ..	2200	1841	83.7
14. Aŭstrujo ..	700	585	83.6
15. Francujo ..	5200	4339	83.4
16. Britujo ..	12500	10358	82.9
17. Nederlando	5100	4205	82.4
18. Italujo ..	1450	1150	79.3
19. Usono ..	3100	2257	72.8
20. Nov-Zelando	850	580	68.2
21. Irlando ..	250	165	66.0
22. Hungarujo ..	1400	895	63.9
23. Kanado ..	250	155	62.0
24. Argentino ..	1000	530	53.0
25. Norvegujo ..	1500	775	51.7
26. Islando ..	660	305	46.2
27. Pollando ..	4650	1815	39.0
28. Egiptujo ..	250	75	30.0



J. Régulo Pérez :

### PRI LA SIGNIFO DE LA SIGNO &

Du artikolojn mi jam legis en Esperantistaj gazetoj pri la origino kaj signifo de la signo &. Ambaŭ deklaris, ke ĝi estas la plej antikva signo por la koncepto de la vorto *kaj*, kaj ke ĝin eltrovis la gramatikisto Marcus Tullius Tiro, stenografisto de Cicero, 63 jarojn antaŭ Kristo. En tiuj artikoloj troviĝis ankaŭ la aserto, ke tiu prasigno ankoraŭ vivas en kelkcent lingvoj, ĉiam kun la sama signifo.

Nu, ĉu vere ĉiam kun la sama signifo? Fakte ne tiel estas. En la nuna hispana lingvo ĝi egalas al nia *k.t.p.*! La *Vortaro kaj la Gramatiko*, kiujn eldonas la *Academia Española de la Lengua* (Hispana Lingvo-Akademio), verkoj, kiuj ĝuas tre vastan akcepton kaj sendiskutan aŭtoritaton, metas sendistinge la mallongigojn *etc kaj &* por nia *k.t.p.*!

Jen kiel & evoluis ĝis signifo de *k.t.p.* De kiam ĝeneraliĝis la presa arto en Hispanujo ĝis la 18-a jarcento & signifis *kaj* kaj kun tiu signifo ĝi estis vaste uzata. Tamen paralele al ĝi gluiĝis la litero *c* jene: & kun la signifo *et caetera* t.e. latinlingva sinonimo de nia *kaj tiel plu*.

Okazis tamen, ke la hispana lingvo heredis el la latina la vorteton *et (=kaj)*, kiun ĉe la Leona kaj prakastilia latinidaj dialektoj oni elparolis kaj skribis *ye*. Tiun diftongon la kastilia lingvo mallongigis kaj parole kaj skribe ĝis *y*, kiu poste ĝeneraliĝis kun la finvenko de la kastilia kiel hispana nacia lingvo.

Nu, kun la evoluo de *et* ĝis *y* la mallongigo & ne plu estis signo por la du valoroj *et plus caetera* ĉar *et* sola diris nenion al hispanparolantoj. Tiel *et-caetera* eksentiĝis kiel sendependa simpla hispana vorto, kiu fine enradikiĝis. Unu vorto, unu signo. Oni jam ne sentis, ke & estas la egalulo de *et*, kaj sekve la komenca signo de la mallongigo & iĝis etikedo por la kunmeto *etcetera*. Jen do la vojo de la tirona &=*et* ĝis la hispana &=*etcetera*.

Tial ke la nuna hispana ortografio malemas uzi mallongigojn, kiujn oni ne povas senbare presi aŭ tajpi, & ekcedis sian lokon al sia egalulo *etc*, kiu certe baldaŭ fariĝos ekskluziva. Tamen ankoraŭ hodiaŭ la asertitan ĉiulokan samsignifecon de & kontestas dudeko da hispanparolantaj ŝtatoj, kie & rolas nur kiel sinonimo de nia *k.t.p.*

Oni iafoje renkontas la signon & ankaŭ en Esperanto, kiel egalulon de *kaj*. Tiel, ekzemple, uzas ĝin P.E. Stojan en sia *Bibliografio de lingvo internacia* eldonita de la U.E.A.-Libroservo en 1929, kaj en sia *Deveno & vivo de la lingvo Esperanto* publikigita en *Flandra Esperantisto*

1947-49. Por ĝi oni pledetas ankaŭ en kelkaj sciencaj rondoj.

Tamen ĉu & estas uzinda en Esperanto? Nia ĝisdata tradicio ĝin repuŝas; kaj cetere samrajte povus peti lokon *£, \$, @, k.t.p.* Kun ties enveno certe tuj levigis la demando, kiel nomi ĉiun tian signon? Por & oni probable proponus *kaj*, kio estus nur balasto.

Ŝajnas al mi, ke laŭ la modeloj de *k.t.p., t.e., bv.* kaj aliaj, se oni nepre volas mallongigon, estu ĝi konsekvenca *k*. Ĝi almenaŭ havas ian Esperantan tradicion. Mi diru, ke mi neniam uzas la mallongigon *k*. sed mi prefere uzas ĝin ol la fremdajon &, kiu, kiel mi pruvis, povus naski konfuzon pro la internacia malsameco de ĝia semantika valoro.

## ESPERANTISTA VIVO

### Naskiĝo

**Bastijančić**, al Ges-roj en Karlovac, Jugoslavujo, 4 aprilo 1950 filino Espera.

**Denis**, al Ges-roj en Saudrupt, Francujo, 2 majo 1950 filo Bernard.

**Jurgens-Binoir**, al Ges-roj en Kapellen (Antwerpen) 27 marto, 1950, filo **Leo**.

**Reville** al Ges-roj E. en Manchester, Anglujo, 5 majo 1950 filo Ian James, frato por Heather.

Ni esprimas niajn plej sincerajn gratulojn.

### Niaj mortintoj

Ni eksciis pri la forpaso de la jenaj gesamideanoj, al kies parencoj ni volas esprimi nian profundan kondolencon.

**Camuffo**, S-ino Giorgina, edzino de nia Del. en Trieste, mortis la 4-an de aprilo 1950.

**Deligny**, S-ro Ernest, L.K. 24 februaro 1950 en St. Omer, Francujo. Del. kaj Honora Membro de U.E.A. Esperantisto de 1900. Antaŭe estis Volapükisto. Ĝisosta samideano, li kunarangiis la unuan internacian renkontigon en Calais 1904, kiu tiel brile preparis la vojon al la unua U.K. en Bulonjo-sur-Mar. Fervore laboris por nia afero sur multaj kampoj sed koncentris siajn energiojn al organizo kaj kreo de spirita centro en la nordo de Francujo. En 1938 donacis al la urba biblioteko de St. Omer sian altvaloran kaj ampleksan bibliotekon Esperantistan, kun unikaj dokumentoj el la unua periodo de la movado.

**Gerisch**, S-ro Hugo, 17 feb. 1950 en Picton, Kanado. Del. de U.E.A., senlaca propagandisto. Origine el Saksujo.

**Eltanko** en Chengtu, Ĉinujo, 1 dec. 1949. Fervora samideano kaj membro de la Ĉina komunista partio. Tradukinto de multaj revoluciaj kantoj en Esperanto. Del. de U.E.A.

**Pierre**, S-ro E., 25 feb., 1950 en Bruxelles, 64-jara. FD. de U.E.A.

**Shipley**, S-ino R., en aprilo, post trimonata malsano, en Bournemouth. Tre fervora kaj multjara laboranto por nia afero.

**Woolnough**, D-ro S. J., 1 feb. 1950 en Hazelbrook, Aŭstralio. Del. de U.E.A.

EN

Solve

Molière

Gajni

F-ino A

S-ro L.

115, S-

Couwen

Modoo

Hansen

Solve

N-

Stosilve

kripto,

koloso,

fatala,

N-ro

kanvas

kariolo

kamlot

lavango

kostum

N-ro

arniko,

kulero,

regulo.

Enig

fakoj

literon.

ĉiu vo

indikas

komen

de la c

estas :

3. not

juvelst

8. arm

(ED) ;

(ED) ;

(AB) ;

17. de

(AF).



**ENIGMA KONKURSO N-ro 49**

Solvejti oni sendu al S-ro P. H. Mooy, 20-A, Avenue Molière, Brussel-Forest, Belgujo.

Gajnis la premiojn post kontrolo de la 45-a konkurso : F-ino A. Reiné (Ned.) 118, S-ro J. Soyeur (Belg.) 118, S-ro L. Staal (Ned.) 117. Sekvas post ili : S-ro G. Turin 115, S-ro F. O. Bevan 111, S-ro G. Englert 109, S-ro Fr. Couwenberg 107, F-ino A. C. Nilssen 107, S-ino N. Koudijs-Modoo 106, F-ino N. Hanson 106, S-ro A. E. Rosengaard-Hansen 105, S-ro B. S. Trier 98, S-ro V. Marcone 95p.



**Solvej de la enigmoj en konkurso n-ro 47 :**

**N-ro 101 :** Por gasto ne petita mankas kulero. Slosilvortoj : kanalo, stampo, dianto, kulero, talero, kriptio, soriko, blinda, krusto, frosto, akselo, strato, koloso, plendo, rimeno, sterko, diareo, strigo, vetero, fatala, drinki, baleno, satiro, fringo, gazeto, fiasko, skrapo.

**N-ro 102 :** Virina rideto pli kaptas ol reto. Slosilvortoj : kanvaso, faringo, artrito, batisto, ĉarniro, arkaika, fabriko, kario, bandito, lavendo, kaŝtano, eskorto, ĉampano, kamlotio, kolibro, kalkano, miraklo, karpeno, martiro, lavango, monstro, rotondo, kotleto, ĉevrono, maleolo, kostumo, koboldo.

**N-ro 103 :** alineo, angeliko, angilo, angulo, argilo, arniko, galero, galerio, geranio, klingo, kranio, kringo, kulero, laguno, lanujo, lariko, laringo, likeno, nikelo, regulo.

**Enigmo N-ro 107 : Sesangula enigmo :** Ĉiu el la ses fakoj ĉirkaŭ numerita sesanguleto devas enhavi unu literon. Tiuj ses literoj formas vorton. Ĉe la klarigo de ĉiu vorto troviĝas interkrampe du literoj. La unua indikas (laŭ la apude presita sesanguleto) la fakon en kiu komenciĝas la koncerna vorto ; la dua indikas la lokon de la dua litero de tiu vorto. La signifoj de la 19 vortoj estas : 1. severa (ED) ; 2. metafora esprimo (EF) ; 3. nobela titolo (CB) ; 4. primitiva vorto (CB) ; 5. juvelŝtono (ED) ; 6. grenmuelitaĵo (AF) ; 7. cifero (AF) ; 8. armaĵo (CB) ; 9. frukto (AF) ; 10. ebenaĵo kun balustrado (ED) ; 11. serpentosimila fiŝo (CB) ; 12. tabelo de kalkuloj (ED) ; 13. delikata tuŝeto (CD) ; 14. el teksebla lanugo (AB) ; 15. vira voĉo (AB) ; 16. troviĝas sur vestaĵo (CD) ; 17. despoto (EF) ; 18. kajo (ED) ; 19. kampa fortikaĵo (AF). Ensendis S-ro J. Soyeur.



**ESPERANTO KAJ RADIO**

*Mallongigoj :* I=Informoj, P=Parolado, K=Kurso.

<b>Ĉiutage</b>	14.45-15.00	Praha. 25.5m. I. Ĉeĥoslovaka Radio Esp.-sekcio, Stalinova 12, Praha XII.
	18.45-19.00	Sofia. 39.11m. P. Radio Sofia.
	21.00-21.15	Praha. 31.41m. P.
<b>Dimanĉo</b>	16.00-16.20	Roma. 19m. kaj 25m. I. Radiodiffusioni Per L'Estero—Esperanto—Via Veneto 56, Roma, Italujo.
<b>Lundo</b>	05.30-05.35	Wien. 513m., 31m., 41m. I.
	16.30-17.00	Rio de Janeiro. 375m., 30.71m. K. Rádio Ministério da Educação e Saúde, Rio de Janeiro, (DF), Brazilo.
	21.50-22.00	Praha. 470m. P.
<b>Mardo</b>	11.50-11.55	Bern. 48.66m., 31.46m., 13.94m. P. D-ro Baur. SRG, Kurzwelldienst, Neuengasse 28, Bern.
	17.35-17.40	Bern. Kiel je 11.50, sed anst. 13.94m. sur 25.39m. (Krom la unua mardo).
	23.45-24.00	Gvatemalo. 49m. I. Estación Cultural de la Voz de Guatemala, Guatemala Cd. C. Ameriko.
<b>Merkredo</b>	19.15-19.30	Warszawa III. 48.23m. I. Pola Radio, Warszawa, Koszydowa 8.
	21.50-22.00	Praha kiel lunde.
	22.00-23.00	Praha II. 470m., 315m. Verda Stacio nur la unuan merkredon. Stalinova 12, Praha XII, ĈSR.
<b>Ĵaŭdo</b>	11.55-12.00	Bern. Kiel marde. D-ro Privat.
	17.35-17.40	Bern. Kiel marde. D-ro Privat.
	08.05-08.20	Paris. 347m. K. (ĉiun duan vendredon).
	14.30-14.45	Graz. 240m. K. Radio Graz, Esperanto-Voĉo, Zusertalgasse 14/a, Graz, Aŭstrujo.
	15.40-15.55	Wien. 203m., 25m., 31m., 41m. I. Ĉiun duan vendredon. Radio Wien, Argentinierstr. 30a, Wien IV.
<b>Vendredo</b>	16.00-16.20	Roma. Kiel dimanĉe.

**Klarigo**—En la tabelo la horoj de la dissendoj estas laŭ la horsistemo de Greenwich. Por Mez-Eŭropa tempo oni aldonu unu horojn.

Ĉiujn informojn pri radio sendu al S-ro G. Largiantier, 29 Bd. Murat, PARIS 16, Francujo.

**Grava atentigo :** Ni konsilas sendon de leteroj al Radio Roma, pro la restarigo de regulaj elsendoj en Esperanto. Bonvolu atenti la informojn pri la XXII Int. Kongreso de Katolikaj Esp-istoj en Romo (10-17 aŭg.) kaj la respondojn al aŭskultantoj, kiuj estas invitataj sin anonci per interesaj demandoj.

**Enigmo N-ro 108 : Sesangula enigmo :** (uzu la saman desegnon, kiel por N-ro 107) 1. nefleksebla (BA) ; 2. poparta (FE) ; 3. fortika ĉeno (BA) ; 4. manĝebla radiko (CB) ; 5. la plej alta perfekteco (AB) ; 6. havanta nenium finon (AB) ; 7. malsupro de ŝipo (DE) ; 8. senfenestra ĉambro (AB) ; 9. hemia elemento (AF) ; 10. rilata al iu lingvo (AF) ; 11. vegetaĵo (CB) ; 12. sameco de sentoj (AB) ; 13. plibonigaĵo por kulturgrundo (DC) ; 14. karakterizas iun, kiu kredas al Dio (CD) ; 15. longa bluzo (CB) ; 16. meblo (AF) ; 17. ujo por fluaĵoj (BC) ; 18. voĉdoni (BC) ; 19. objekto por esti imitata (CD). Ensendis S-ro J. Escaré.



# UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

Centra Oficejo : Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo  
OFICIALA INFORMILO

N-ro 227.

1-an de Majo 1950

**DELEGITOJ**

**Britujo**

**Bedford.** D : N. G. Wright, 79 Pilgrims Way, Mile Road.  
**Brighton.** FD (Mondfederalismo) : A. E. Sullivan, 12 Queens Park Rise, Brighton 7.

**Egiptujo**

**Fayoum.** D : Nasif Mahrus.

**Finnlando**

**Järvenpää.** D : Erkki Isomäki, Vuoritie.  
FD (Skoltismo) : La D.

**Francujo**

**Pontoise (S. et O.).** D : H. Picou, Station de T.S.F.  
Tel : 78, et. 22.

**Germanujo**

**Bremen.** FD (Juro) : G. K. F. Ziegler, Stolbergerstr. 13.

**Hungarujo**

**Budapest.** FD (Korespondado) : Miklós Abrahám, II, Vöröshadsereg-utja 4/b, II. 6.  
**Győr.** FD (Tajloraj aferoj) : G. Mezei, Rónay Jácint u. 6.

**Italujo**

**Cremona.** D : L. Topi, Corso Garibaldi 34.

**Kanado**

**Duncan (B.C.).** D : H. P. Devenish, Duncan R.R.1.  
Tel : 504.L.3.

**Meksikio**

**Meksiko.** D : F. Azorin, Guadalquivir 41.E. Tel : 288952.

**Svedujo**

**Karlskrona.** FD (Kristanismo) : A. Lundkvist, c/o Vidal, Alamedan II.

**ŜANĜOJ**

**Aŭstralio**

**Adelaide.** FD (Tramoj) : vakas.  
**Ballarat.** FD (Magio) : nova adreso : c/o Allen, 411 Havelock St.  
**Bogong.** D kaj FD : vakas.

**Belgujo**

**Bruxelles.** FD (Administrado) : vakas.  
**Leuven.** D : vakas.

**Britujo**

**Clevedon.** D : vakas.  
**King's Lynn.** D : vakas.

**Francujo**

**Nantes.** FD (Farmacio) : nova adreso : Place de l'Edit de Nantes.  
**Saint-Omer.** D : vakas.

**Germanujo**

**Kiel.** FD (Juro) : vakas.

**Hungarujo**

**Ĉefdelegito** : vakas.  
**Budapest XIV.** VD : vakas.

**Jugoslavujo**

**Zagreb.** FD (Kemio) : nova adreso : Vlaška 53, II.

**Nederlando**

**Amerongen.** D : nova adreso : Rijkssstraat B 104.  
**Breda.** FD (Korpa edukado) : vakas.  
**Zand.** D : vakas.  
**Zeist.** D : vakas.

**Svedujo**

**Malmö.** FD (Kristanismo) : vakas.  
**Sköldinge.** FD (Fervojoj) : vakas.  
**Stockholm.** FD (Sporto) : nova adreso : Alvsborgsgatan 9 IV.

**NOVAJ DUMVIVAJ MEMBROJ**

Goldman, S-ro T. A., Washington, D.C., Usono.  
Hanks, S-ino I. P., Melbourne, Aŭstralio.  
Hanks, S-ro E., Melbourne, Aŭstralio.

**MEMBRO-SUBTENANTOJ 1950**

- 249. Apcher, Prof. L., Meknés, Maroko.
- 250. Taylor, S-ro F. V., Albury, Aŭstralio.
- 251. Cettini, S-ro G., Sondrio, Italujo.
- 252. Vugrinec, S-ro Z., Slav. Pozega, Jugoslavujo.
- 253. Richardson, D-ro R. H., Beloit, Wis., Usono.
- 254. Knecht, S-ro F., Casablanca, Maroko.
- 255. Heap, S-ro W., St. Annes-on-Sea, Anglujo.
- 256. Buchli, S-ro H., Bern, Svislando.
- 257. Garbala, Pastro J., Gdansk, Polujo.

**DONACOJ.** J. Thibon 3s., D. J. v. d. Heever 2s., A. W. Moody 2s., E. Curtenaz 3s., A. Ploussu 12s.

Sinceran dankon al ĉiu helpanto.

**STATISTIKO.** Jen la stato de la membraro je la fino de Aprilo, kaj ankaŭ, por komparo, je la fino de Aprilo 1949:

	1949	1950
Asociaj membroj ..	4049	4702
Individuaj membroj :		
MJ .. .. .	605	633
MA .. .. .	3592	3678
MS .. .. .	324	261
Patronoj ..	15	14
DM .. .. .	179	198
HM .. .. .	57	56
	4772	4840
	8821	9542

CECIL C. GOLDSMITH, *Sekretario.*

**Dankon :** Ni deziras esprimi al F-ino E. M. Herbert en Londono nian sinceran dankon pro la desegno uzata kun *Nia Forumo*, kiel ankaŭ pro desegno, kiun ni eventuale uzos por rubriko *Rido Sanigas*.

**MALGRANDA REVUO :** Unuaranga literatura revuo Esperantista. Aperas 6-foje en la jaro. En ĉi tiu revuo kristaliĝas la plej bonaj tendencoj de la lingvo-evoluo kaj la uzado. Redaktata de Stellan Engholm. Abonprezo 8 ŝil. 6 pencoj ĉe U.E.A.

Ant  
interŝa  
Frei  
Bosvo  
prospe  
holoto  
La  
scienc  
certan  
kaj pr  
senco.  
Ĉeĥol  
Por  
Belgu  
ĉe :  
Brusse  
Ferio-  
Kur  
100-ja  
Dez  
Esper  
37 Up  
26-j  
deano  
Södra  
Hor  
Ocean  
Filoir  
Mor  
julio-  
Belgu  
vidpu  
109, E  
50 g  
gazet  
per i  
Hirak  
Pri  
sciind  
Neder  
fabrik  
50  
en la  
Castel  
Ital  
Lerne  
Giova  
Pagar  
4, Mil  
Ital  
Lerne  
Maria  
Angel  
via I  
dell'O  
Foppa  
Milan  
Leso,  
26, M  
23-j  
ilustri  
Viton



# ANONCETOJ

*Kosto : du pencoj por ĉiu vorto, aŭ internacia respondokuponon por ĉiu duo da vortoj.*  
**Ĉiu anoncanto morale devigas sin respondi minimume unu fojon al ĉiu kiu skribas.**  
**Anonceto por iu numero devas atingi nin antaŭ la 6-a de la antaŭa monato.**

**Antonio Pastor**, Ercilla 49, 5, Bilbao, Hispanujo, deziras interŝanĝi il. pk. kun ĉiuj landoj. Nepre respondos.

**Fremdultrafika Servo en Belgujo**, Konijnenperken 109, Bosvoorde-Brussel, Belgujo sendas Esperantajn turistajn prospektojn, prizorgas malmultekostajn Esperantistajn hotelojn.

La nova **Kristanismo** bazita je la doktrino de sveda scienculo kaj reformanto Em. Swedenborg, enportas la certan lumon en la homan animon pri la postmorta vivo kaj pri la vera religio bazita je la Biblio kaj ĝia interna senco. Informas : J. B. Vlach, Lužická 21, Praha XII, Ĉeĥoslovakujo.

**Por malmultekosta restado** (gejunuloj) en Nederlando, Belgujo, Francujo, Svislando, Luksemburgo, informiĝu ĉe : Turista Servo, Konijnenperken 109, Bosvoorde-Brussel, Belgujo. Tel : 48.44.36. Petu prospekton de la Ferio-gastejoj (rpk).

**Kuracisto 60-jara** deziras korespondi pri rimedo fariĝi 100-jara. D-ro Wegener, Hollestr. 1, Essen, Germanujo.

**Deziras korespondi** kun altgradaj gesamideanoj sole pri Esperantaj aferoj, gramatiko, k.t.p. S-ro A. Moody, 37 Upper Tooting Road, London, S.W.17, Anglujo.

**26-jara finno** deziras korespondi kun anglaj gesamideanoj. Skribu al S-ro E. N. E. Järvinen, c/o Thoren, Södra Vägen 56, Göteborg, Svedujo.

**Honestege mi interŝanĝos pm.** kun Afrikano, Aziano, Oceaniano ; nepre respondos, S-ino Alice Collet, 1 Rue du Filoir, Etampes (Seine et Oise), Francujo.

**Monata Internacia Kurso por Junuloj** (francilingve) 15 julio-15 aŭg. ; 15 aŭg.-15 sept. Temo : Signifo de Belgujo sub historia, literatura, arta, ekonomia, socia vidpunkto. Informoj ĉe : Turista Servo, Konijnenperken 109, Bosvoorde-Brussel, Belgujo.

**50 gegrupanoj deziras korespondi** kaj interŝanĝi ilustritajn gazetojn, pk., pm., Nepre garantias respondon. Skribu per il. pk. Koresponda Grupo, Oka-Shinmachi 260, Hirakata, Osaka, Japanujo.

**Pri telepatio kaj antaŭsciado** volonte interŝanĝos sciindaĵojn K. Wilgenhof, Wilhelminastraat 28, Beverwijk, Nederlando. Deziras korespondi ankaŭ pri elektraĵaj fabrikaj instalaĵoj kaj esperantismo.

**50 italaj gelnantoj** deziras korespondi kun junuloj en la tuta mondo. Certa respondo. Adresu : G. I. E., Castella postale 127, Torino, Italujo.

**Italaj lernantinoj 16-18-jaraj** ĉe Komerca Teknika Lernejo deziras korespondi tutmonde kun gejunuloj : Giovanna De Gaspari, via Grivola 18, Milano ; Paola Pagani, via Ornato 7, Milano ; Elena Sala, via Marmolada 4, Milano ; Vania Ceresa, via Alserio 3, Milano.

**Italaj lernantinoj 16-18-jaraj** ĉe Komerca Teknika Lernejo deziras korespondi kun junuloj 18-25-jaraj : Maria Piccinelli, via Porro Lambertenghi 12, Milano ; Angela Niboldi, via Fiori Chiari 24, Milano ; Irma Sattin, via Dario Papa 24, Milano ; Mariarosa Chiovini, via dell'Orso 10, Milano ; Giancarla Vigano, Largo La Foppa 5, Milano ; Biancamaria Rigon, via Poliziano 10, Milano ; Mirella Zanazzi, via Imbriani 25, Milano ; Lucia Leso, via dell'Orso 4, Milano ; Maria Candotti, via Aprica 26, Milano.

**23-jara Jugoslavo** deziras korespondi kaj interŝanĝi ilustritajn poŝtkartojn kun la tuta mondo. Babić Vitomir, Vončinina 7, Zagreb II, Jugoslavujo.

**Filatelistoj !** Por 50 (ne)uzitaj vialandaj pm. ordinaraĵoj, memorigaj, aŭ aerpoŝtaj, samkvante kontraŭsendos Remigio Novak, via Pascoli 23, Triente (210), Italujo.

**Isidro Roca**, Villarroel 178, 4, Barcelona, Hispanujo, sendos 25-30 stampitajn malsimilajn hispanajn poŝtmarkojn interŝanĝe kontraŭ la sama kvanto el via lando.

**Letervesperon aranĝos Esperanto-Grupo Nürnberg** la 15an de julio 1950. Ĉiu letero estos respondata. Adresu : Otto Pilhofer, Nürnberg 19, Mögeldorf Hauptstr. 2, Germanujo.

**Akompananto dezirata** por mallonga tendada vojaĝo, per biciklo aŭ kanoto. Prefere Francujo. S-ro Blake, Tower Hill, Horsham (Sussex) Anglujo.

**S-ro Ford deziras interŝanĝi** alumetajn skatolajn etiketojn : 38 Ash-hill Road, Torquay, Anglujo.

**Mondfederalistoj (kaj aliaj) !** Presaĵon "Monda Federacio" kaj informilon pri "La Plano de la Tutmonda Popola Delegitaro" ni sendos kontraŭ unu respondokuponon. World Student Federalists, 22 Standish Road, London, W.6, Britujo.

**Toponomio** : P. Serra, Rua M. Gomes 22, Aveiro, Portugalujo, deziras korespondi kun la tuta mondo nur pri loknomoj (urboj, vilaĝoj, stratoj, riveroj, bienoj, k.t.p.).

**Hispanujo.** E. Moreno Medrano, Entenza 131, Barcelona, sendos samkvante pm. novajn kaj stampitajn aŭ pk. kun ĉiuj landoj.

**Pedro Calvo**, Plaza Mayor 11, Palencia, Hispanujo, deziras korespondi pri filatelo, navigacio, militisto, Angla, Franca, Esperanta, ĉiuj landoj.

**Libertempo en Hispanujo.** Du personoj samtempe povus esti ricevitaj kiel gastoj en plej bela kvartalo de Madrido ĉe Esperantista familio. 2-4 semajnojn inter Oktobro kaj Julio. Interŝanĝe kontraŭ simila gastigado eksterlande inter Julio 10 kaj Septembro 25. Preferata somera urbeto apud maro kaj montoj. Bonvolu skribi konfidence detalajn proponojn al Ge-sroj Alvarez, Apartado 1257, Madrid.

## DIABLET' EN LA BOTEL'

de

Robert Louis Stevenson

Elangligis

Jozefo Seka

48 paĝoj : 1s. 10p. aŭ 7 rpk., afrankite

Eldonita en Germanujo

★

Mendu ĉe

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO  
Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo



Majstroverko el Hispanlando

# SANGO kaj SABLO

de

Vicente Blasco Ibañez

tradukita de

Ramón de Salas Bonal

Per ĉi tiu romano, pulsanta je vivo, Ibañez tenas spegulon antaŭ la multekolora vivo iberia. La leganto partoprenas en la viglo, la koloro, la pasio kaj ankaŭ la mizero de la hispana popolo, kaj akiras ian komprenon pri ĝia animo.

Verŝajne neniu alia verko permesas tiel intiman bildon, kaj estas tiel detale informa, pri la aranĝo de la taŭrfestoj (bovbataloj), kaj traktas tiom objektivite pri la timoj, luktoj, amoj, ĵaluzoj kaj etaj gloroj de la toreadoroj.

Trege neordinara verko. Streĉe interesa.

Prezo : 9 ŝilingoj, afranko 6 pencoj

*Mendu tuj ĉe*

**UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO**  
Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo

# SOMERA UNIVERSITATO

(Malmö 1948)

ENHAVO

Enkonduko	- - - - -	<i>Rektoro Karl Söderberg, Svedujo</i>
La laponoj kiel kultura popolo	- - - - -	<i>Profesoro B. Collinder</i>
La kimraj artofestoj	- - - - -	<i>R. Rossetti</i>
El la mirinda naturo	- - - - -	<i>C. Stöp-Bowitz</i>
Astronomiaj sensacioj	- - - - -	<i>Profesoro K. Lundmark</i>
Cefprincipoj de la nuntempa internacia juro	- - - - -	<i>Profesoro D-ro Ivo Lapenna</i>
El la fronto kontraŭ la malamikoj de la kulturplantoj	- - - - -	<i>D-ro P. Neergaard</i>
La kalevala kulturo	- - - - -	<i>Vilho Setälä</i>
Pri la sveda koopera movado	- - - - -	<i>Rektoro S. A. Stahre</i>
Du svedaj humoristoj kaj unu hungaro	- - - - -	<i>D-ro F. Szilagyi</i>

La libro enhavas la tekstojn de la prelegoj en Malmö

Prezo 4 ŝil. Afranko 2p.  
(17 respondkuponoj)

*Mendu ĉe*

**UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO**  
Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo